

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)


**Kalocsay:
Kio restis en
lia tirkesto?**



**Unesko-
konferenco:
La potenco
de kulturo**



**AVE: Asocio
por lingvo
kaj ekologio**



Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo

Vi trovos...

81 Malferme

Unueco en diverseco

LEE Chong-Yeong

82 SUR LA VOJOJ DE NIA PLANEDO

Maryvonne Robineau

Vagabondoj de moderna tempo, ili trovis la homojn tiaj kiaj ili estas: kiel vi kaj mi.



Komplete de gas-voj Robineau

85 Eksteraj rilatoj

Libereco de kreado estu homa rajto

Christer Kiselman

UEA ĉeestis gravan Unesko-konferencon.

86

Literaturo

OMAGĖ AL KALOCSAY ELTIRKESTIĜU!

Intervjuo kun Ada Csizsár, prizorganto de la Kalocsay-heredaĵo



Foto: Fabienne Berthelot

88 Instruado

ILEI SOJLE DE JUBILEO

89 Interlingvistiko

KATEDRO KREAS SENSACION

István Ertl

Kreo de interlingvistika katedro vekis intereson en Nederlando.



Foto: B.A.E.M. Meulandjke

90 Fakaj asocioj

La plej verdaj verduloj

Manfred Westermayer

Prezentiĝas Asocio de Verduloj E-istaj.

91 REAGJOJ

92 RECENZOJ

N. Rossi pri Lirikaj perloj de Al-Andalus. A. de' Giorgi pri La maljunulino... J. Camacho pri Urno kun runoj. K. Kniivilä pri du ŝaklibroj. B. Berthonneau pri du sanlibroj.

95 LASTE APERIS

Kaj plue...

96 NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ LOKE, FAKE

La kovrilo: Bruno Robineau kun du hondurasaj infanoj.

98 PERSONE

99 RADIO-TABELO

Malferme: E-balono flugis dum la Lucerna UK, 1979. (UEA-Arkivo)

100 NEKROLOGOJ

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefaksa: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:



UNUECO EN DIVERSECO

Universala Esperanto-Asocio estas unika ne-registara monda organizaĵo, fierinda pro sia 90-jara historio, siaj respektindaj celoj kaj siaj bazaj konceptoj de universaleco en neŭtraleco kaj de unueco en diverseco. De sia naskiĝo la 28-an de aprilo 1908, UEA trapasis multajn malfacilaĵojn, eksterajn kaj internajn, organize kaj finance. Sed la moderna UEA de post la dua mondmilito fariĝis modelo de neŭtrala, mondskala kaj demokratia organizaĵo neregistara.

La neŭtraleco de UEA kondukas al ĝia universaleco. Ĝia statuto (1908) diras: "UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco". Aldoniĝis en 1933 neŭtraleco rilate al sociaj demandoj, kaj en la nuna statuto: rilate al raso kaj sekso. Tio signifas ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj. Tiu neŭtraleco helpas al UEA esti universala, geografie kaj fake.

Sed la neŭtraleco de UEA ĉesas je du punktoj: homaj rajtoj kaj la internacia lingva problemoj. Jam en 1947, unu jaron antaŭ la proklamo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, UEA statute deklaris ke "la respekto de la homaj rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo". Pro sia dediĉiteco al la homaj rajtoj, pli ol dekfoje UEA estis kandidatigita, de pli ol 700 eminentuloj, al la Nobel-pacpremio. La neŭtraleco de UEA ĉesas tie kie la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas malobservataj.

La neŭtraleco de UEA necese ĉesas ankaŭ tie kie komenciĝas atakoj aŭ malhelpoj kontraŭ Esperanto kaj ĝia movado. Esperantistoj povas kreskigi kaj florigi interne de la movado diversajn pensojn kaj ideojn — krom tiuj kiuj kontraŭas la esencon de Esperanto, internacia lingvo, aŭ malobservas homajn rajtojn. Tio estas aktiva neŭtraleco.

Alia karakterizaĵo de UEA estas "unueco en diverseco" kaj "diverseco en unueco". Unuflanke, UEA unuigas ĉion komunan al ĝiaj konsistigaj eroj; aliflanke ĝi maksimume helpas la laboron de ĉiunivelaj kaj fakaj grupoj, por ke ĉiu povu ĝui la avantaĝon de unueco por atingi siajn celojn. UEA centrigas tiujn agadojn kiujn povas efike plenumi nur la centraj organoj de la Asocio, kaj malcentrigas la taskojn realigeblajn de teritoriaj aŭ fakaj organizaĵoj. UEA klopodas harmoniigi la tutan laboron de Esperantujo, ĉar tio kio estas bona por Esperanto estas bona por UEA. Sed por tenadi la koncepton de unueco en diverseco, foje ĝi bezonas minimumon da socia disciplino kontraŭ malprudenta agado kiu male influus la komunan celon de nia movado.

La 90-jariĝanta UEA, pere de Kampanjo 2000, celas disvastigi sian fierindan modelon en la mondo. La tuta esperantistaro kontribuu per aktivaj iniciatoj al la komuna celo kiun ankaŭ UEA alstrebas. Ĉio bona por Esperanto estas bona por UEA, kaj ankaŭ ĉio bona por UEA estas bona por Esperanto!

LEE Chong-Yeong

Sur la vojoj

Post aŭdvida prezento fare de Maryvonne kaj Bruno Robineau, la publiko ĉiam foriras kun informoj pri Esperanto kaj ofte kun favora sinteno al ĝi. Por multaj temas pri malkovro: tiu lingvo ekzistas kaj eĉ utilas. Regule, iuj ekstudas Esperanton. Kion do rakontas la paro Robineau? Ĉu ili raportas pri la lingvaj problemoj? proponas kurson de Esperanto? Tute ne! Ili rakontas sian okjaran mondvojaĝon.



Maryvonne Robineau

de nia planedo

"Mi neniam kredus ke vi faros ĉi tiun mondvojaĝon!" La patrino de Bruno larmas en tiu tago de aŭgusto 1985, kiam sur la vojrandoj ŝi adiaŭas sian grandan filon, kiu foriras por travivi sian revon.

Certe, jam de longe, de dudek jaroj ŝi memoras tiun frazon de la dekunu-jara knabeto, kiu deklaris firme: "Panjo, iun tagon mi vojaĝos ĉirkaŭ la mondo." Ĉirkaŭiri la mondon? Sensencaĵo, kiam oni naskiĝis en kamparana familio kun radikoj en sia hejma grundo. Sed tiu ideo neniam forlasis la knabon, kiu fariĝis siavice agrikulturisto. En li ardas la flamo iri ĝis la limoj de la tero por kunsenti la ĉiutagon de la homoj, por pluki facetojn de ilia saĝo.

Tiun rondiron ĉe la homoj Bruno ĉiam imagis solula. Sed jen ni ambaŭ levas la difingron en tiu tago de la granda ekiro. Mi, la trankvila sekretariineto, estis logita de tiu kiu parolis pri la vojaĝo kiel nova vivo, alia maniero ekzisti kaj ami. Ni estis forirontaj por kvar jaroj. Ni ja bezonas ok jarojn por konatiĝi kun dekkvino da landoj, de Irlando al Bolivio. Ok jarojn por plekti ligilojn, transpaŝi limbarojn, ne nur de ŝtatoj, sed ankaŭ de niaj antaŭjuĝoj, de niaj pratimoj.

Laborforto kontraŭ gastigo

Ni komencas nian ĉirkaŭmigradon de la homaro per bicikla vagado en la verda Irlando. Ĉar ni laboretas tie kaj jene en la farmobienoj, nia restado planita je unu monato longiĝas al kvin monatoj. Ekde tiam ni difinas la gvidmotivon de nia migrado: ekkoni kaj ami popolon realiĝas nur tra la daŭro. Se oni deziras renkonti la homojn, kunvivi iliajn emociojn, percepti la plej etajn partojn de ilia vivo, tiam necesas demeti siajn pakajojn, aldoni tagojn al la tagoj, semajnojn al la semajnoj, monatojn al la monatoj.

Post Irlando ni direktiĝas al Israelo kaj al la kibuco Naan, kie ni laboras kiel volontuloj. Tiel ni realigas nian ideon ne vojaĝi kiel spektantoj, sed partopreni la laboron de la homoj por pli bone koni ilin, interŝanĝi la laciĝon de niaj muskoloj kontraŭ gastigo kaj nutrado, nin kunfandi kun iliaj familioj, dividi kun ili la manĝojn, trinki la saman akvon, frosti pro la sama malvarmo, riski la samajn malsanojn... La kamparana mondo estos la privilegia medio de niaj renkontoj.

Tra Mediteraneo, ni venu al Bulgario. Ĉar tie troviĝas la Esperanto-lernejo de Pisanica. Post hazarda malkovro de la internacia lingvo, ni ekstudis ĝin en Francio per kores-




Hindio:
Maryvonne
instruas E-on
al du ĝajnaj
monahinoj.

Ĉiuj fotoj kompleze de gastejoj Robineau



Bolivio:
(maldekstre) la
paro Robineau
direktiĝas al
indiana vilaĝo je
4300m en la
altebenaĵo;
(sube) Bruno
lernas la arton
plugi kun bovoj.



ponda kurso
antaŭ la vojaĝo, sed la tempo-
raba laboro de Bruno en la farmobieno ne
ebligis al ni daŭrigi la lernadon. Ni do promesis al ni tion
fari survoje, kvankam ni ne tro sciis kion Esperanto povus
alporti al ni. Kvardek tagoj da intensa studado en la Espe-
ranto-domo de Pisanica malfermis al ni la pordojn de
nekonata mondo, ĉar ekde tiam Esperanto fariĝis la vera
ŝlosilo de niaj renkontiĝoj kaj enirigis nin en la intimecon
de multaj familioj. Bela hom-kolekto ekde bulgara labo-
risto ĝis aŭstralia ambasadoro, tra hungara instruisto kaj
japana kadro!

Ni enprogramigis vidi la funkciadon de agrikulturo en
komunista lando. Jen Hungario. Oficiala veturilo, ŝoforo,
interpretisto, luksaj hoteloj kaj restoracioj, kie estas ĉiam
rezervita por ni tablo dekoraciita per franca flago... Plej
oficiala vojaĝo, donace proponita de altrangulo bonkora

kaj... esperantista. La plej memorindaj momentoj de tiu
luksa periodo? Brando trinkenda antaŭ la matenmanĝo
kaj longaj restadoj en vinkeloj!

En la intimeco de hinda vilaĝo

Hindio. Kiam ni alvenas en la vilaĝon Beur en februaro,
estas tempo de la lento-rikolto, kiun baldaŭ sekvos la
gren-rikolto. Ram Prasad akceptas nin per la vortoj: "Mi
estas feliĉa ke Dio elektis min por vin akcepti." Eminent
kulturo de tiuj kiuj scias nek legi nek skribi, sed posedas
kor-noblecon. Ĉiutage ni estas sur la kampoj ekde la
kvina horo por profiti de la relativa malvarmeto. La naj-
baroj miras kaj venas palp-esplori la manojn de tiu stranga
fremdulo, kiu laŭdire estas kamparano en sia lando kaj
kaŭras kun ili sur ilia tero fendetita. La komuna tasko,
nepre universala lingvo, havas la mi-
rindan povon plekti ligojn.

For de la ĉiama agreso de la urboj
kaj homamasoj, en Beur ni iom post
iom impregnas nin per Hindio. Kunvivi
la ĉiutagon de la familioj je ĉiuj lati-
tudoj ne ĉiam estas facile. Niaj du
ĉiutagaj manĝoj konsistas senŝanĝe el
lentoj kaj rizo matene, kaj vespere el
lentoj kun *ĉapati*: tritikaj platkukoj,
priŝutitaj per pinĉo da legomoj. Ses
monatoj da tia dieto perdigis al mi la
dek kilogramojn kiujn mi akiris el la
hungaraj kolbasoj. Vomema pro la
eternaj lentoj, mi freneze sonĝas pri
flue grasaj fromaĝoj kamembertaj kaj

pri krak-krusta franca pano. Bruno, suferanta pro manko
de proteino kaj de vitaminoj, pezas nur 62 kilogramojn
(por 1,82m) kaj trenas sin senenergie, elĉerpita de la plej
eta fizika peno.

De Beur al Tokio: ŝoko!

Jen alia mondo, tre malproksima de Beur: Japanio. Ni ne
kredas al niaj okuloj kiam iun vesperon ni alvenas al la
Tokia kvartalo Shinjuku, kie brilas la sorĉlumo de la
frenza super-ekipita urbo: ĉu la sama planedo?

Nia gvidlibro anoncis nekuraĝigajn perspektivojn por
malkovri la landon de la Leviĝanta Suno: "La eksterlan-
daj turistoj verŝajne ne sukcesos vidi la internon de domo.
Ankoraŭ malpli multaj povos tie tranokti." Tamen ni gastis
ĉe dudek familioj dum nia naŭmonata restado sur japana
tero, se ne alkalkuli gastadon en ŝintoa templo.

Ankoraŭfoje ni povas danki al Esperanto, kiu per sia
gastiga reto Pasporta Servo partoprenigis nin en la vivo de
Kenzi Muraoka, kamparano kultivanta sian trihektaran
rizejon; de Masako Tahira, kiu tiom zorgis pri ni ke
ĉiuvespere ŝi metis kaskon apud nian liton "kaze de
tertremo ĉi-nokte"... Yositaka Kuroyanagi estas kadro
ĉe Toyota. Lia edzino, la ĉarma Umiko, aligis nin al ĉiuj
siaj aktivaĵoj: kursoj pri te-ceremonio aŭ florarango,
geedziĝfesto de familiano...

En Koreio, Bruno brile sukcesas per la drat-bicikloj
kiujn li vendas surstrate. Unu pinĉilo, unu dratbobeno...
kaj el liaj spertaj manoj, sub la mirigitaj okuloj de la preter-
pasantoj, formiĝas bremsoj, radoj, selo... jen biciklo.
Tiu metiistaĵo, kiun li praktikas ekde Irlando, alportas
iom da greno, aŭ pli ĝuste da rizo, por nia kuirejo.

En la miliardhoma imperio

Ĉinion ni vizitas petveture. Malrapide progresas ni per malnovaj anhelaj kamionoj, kiuj ne superas 30 kilometrojn hore kaj nur per konstantaj hupadoj oreĵŝiraj traboras al si la vojon meze de freneza trafiko de piedirantoj, bicikloj, traktoroj kaj ĉaroj.

La universitato de Chengdu invitas nin prelegi pri Esperanto al studentoj de la angla lingvo. Konsentite, sed ni devas atente trakti pri la interŝanĝo: laboro kontraŭ loĝado sur la universitata tereno kaj kontraŭ servoj de studentoj-interpretistoj por konatigi nin kun la kamparanoj de la epoko post Mao. Nia universitata loĝejo konstante pleniĝas de studentoj avidaj je diskuto kun ni, kaj tio ne tro plaĉas al la aŭtoritatoj. Ili provas elpeli nin, sed niaj sufiĉe influaj protektantoj esperantistaj glatigas la aferon.

Nia ĉina vagado poste kondukas nin al Wei Chi, kamparano kiu parolas la internacian lingvon. Ni, "longnazuloj", kreas sensacion en lia izolita vilaĝo de la provinco Shaanxi: la plej aŭdacaj najbaroj venas karesi la vilajn brakojn de Bruno, kaj la maljunulinoj, kies piedoj estis bandaĝitaj en ilia junaĝo, rigardas stupore liajn grandajn piedojn.

Bruno fariĝas vakero

Kvar jaroj pasis ekde nia foriro, kaj ni ankoraŭ ne atingis la duonon de nia vojplano. Bruno ŝatus plu restadi en tiu fascina Azio, sed mi urĝas lin daŭrigi la antaŭviditan itineron. Direkto: Aŭstralio, precipe ĝia kamparo kun tiuj fascinaj malplenaj spacoj vastegaj.

En Kalumpulpa, meze de la veprejo, ni ekkonatigas kun la aborigena mondo. Tiu kontakto plian fojon konsciigas al ni la respondecon de la Okcidento en la detruo de tiom da popoloj. Kiam ĝi alprenas la vizaĝon de mortebria aborigeno, la historio de Aŭstralio, nia historio, nigre koloriĝas kaj ne plu estas tiel ĉarma kiel en niaj infanlibroj.

La bovbredistoj en la veprejoj daŭrigas la pioniran epopeon izole en siaj grandegaj bienoj. La vakeroj de Philip Creek Station, 600-mil-hektara farmobieno, amuziĝas vidante la francan kampulon rajdi ĉevalon malantaŭ grego. Ili atendas la nepran falon, sed vane. Bruno honorinde regas sian rajdobeston.

Forlasu la landon, alie vi mortos!

Unujara halto en Nov-Kaledonio. Sufiĉa tempo por replenigi nian vojaĝistan monujon per salajrata dungo, prepare al la kvara kontinento de nia periplo, Ameriko.

Iun vesperon dum nia restado en Antigua (Gvatemalo), nia dommastrino prezentas al ni leteron, kiu estis ŝovita sub la enirpordon por ni. Kiam mi legas ĝin, miaj manoj ektemas: "Vi disponas pri tri tagoj por forlasi la landon,

alie vi mortos." Subskribo: la gerilo. Ni ne kredas al niaj okuloj. Oni ne povas forbagateli tiun minacon en lando turmentata de murdema febzo, kie la mortminacoj tre ofte konkretiĝas. Eble estus pli saĝe forporti niajn pakaĵojn tuj morgaŭ. Ni tamen alprenas la riskon resti plu. La franca ambasado, informita, prenas la aferon serioze, alarmiĝas kaj petas la lokan policon sekurigi nin: "Bone komprenu ke ni tute ne deziras havi ŝarĝon de du kadavroj." Ni travivas ok tagojn angorplenajn.

Por retrovi iom da sereneco, preferindas restado ĉe la Mam-indianoj, kiuj, ŝirmate de siaj montoj Cuchumatan, konservis la fieracon pri siaj tradicioj. Bedaŭrinde ne eblas plilongigi la vizon por iom plu resti kaj sarki la maizejojn kun tiuj kamparanoj.

Je kvarmil-metra alto

Ni poste direktiĝas al Bolivio. Kiel oni povas vivi el agrokulturado je pli ol kvar mil metroj super la mar-nivelo? Respondo: je tiu demando ni serĉas en Japo K'asa, ajmara vilaĝeto de la altebenaĵo, kie akceptas nin Luis kaj Natividad Cruz.

Ĉiuvespere, en la nura ĉambro de 9m², ni sternas niajn dormosakojn inter la forno kaj la benko el pajl-argilo, kiu utilas kiel lito por la tuta familio. Tiel ni sukcesas konservi iomete da

varmo malgraŭ la ekstera frosto, sed ni ne povas batali kontraŭ la endomaj puloj, kiuj ĝojas trovi la dolĉan manĝotan haŭton de fremduloj. Japo troviĝas je 4300-metra alteco, kaj Bruno suferas pro la altec-malsano. Unika kuracilo efika: maĉi koka-foliojn, kiel faras la indianoj.

Mondmigranta bebo

London, la 7-an de decembro 1992, je la 19-a horo: kiel konsentite, ni atendas en Cochabamba, antaŭ la domo de la Fratulinioj de Sankta Vincento de Paŭlo. Jen fratulino Ana Maria, kiu aŭte alvenas. Ŝi elaŭtigas bluan korbon kaj sakon kun bebotukoj, suĉboteloj kaj kelkaj vestetoj. En la korbo dormas pufvanga bebo. Li estas kvarmonata, nomiĝas Vicente, kaj ŝi transdonas ĝin al ni: "Suĉbotelo ĉiun kvaran horon kun kvin kuleraj da laktopulvoro." Jen ĉiuj uzindikoj por la bebo! Kaj jen ni gepatroj!

Ni pasigis preskaŭ dek jarojn sur la vojoj de la planedo. Pro la kontakto kun la belaĵoj kaj suferoj de la mondo, tia vojaĝo profunde aliigas. Oni ne povas daŭre resti nur spektanto. La ideo fondi familion kun forlasitaj infanoj iom post iom traboris sian vojon en ni. Vicente, nun Vincent, estas la unua ero de amo en tiu engaĝiĝo.

Pasis ok jaroj. Vagabondoj de moderna tempo, ni transpaŝis montojn kaj dezertojn, trapasis urbojn kaj vilaĝojn, renkonte al viroj kaj virinoj en la ĉiutago. Tiujn homojn ni trovis kiaj ili estas, kiaj estas vi kaj mi: teneraj kaj kruelaj, blankaj kaj nigraj, kun siaj angoroj kaj revoj. Kiel strange, do, nomi la alian fremdulo!

Maryvonne kaj Bruno Robineau (Le Moulin Boireau, FR-49270 Landemont, Francio; ☎/☐+33/2/40-98-78-76)



Je la fino de la vojo: Maryvonne kaj Vincent

Komplazo de gres-roj Robineau

Franglingva libro pri la vojaĝspertoj de la paro Robineau (*Et leur vie, c'est la terre*) estas mendebla ĉe ili. Apero de ĝia esperantlingva traduko estas atendata, probable por la Montpellier UK.

Libereco de kreado estu homa rajto

Neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) ĝuis pli da influo ol kutime ĉe interregistara konferenco de Unesko pri "Kulturaj strategioj por evoluigo" (Stokholmo, 30 marto-2 apr.). UEA estis reprezentita de Christer Kiselman, Roland Lindblom kaj Bengt Nordlöf.

Partoprenis, el 140 ŝtatoj, 77 ministroj pri kulturo kaj sume 750 registaraj reprezentantoj. Aliĝis krome ne malpli ol 53 interregistaraj organizaĵoj kaj 100 NRO-j, i.a. UEA kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). La reprezentantoj de ĉi tiu kategorio nombris 950.

La temo, "La potenco de la kulturo", esprimis la klopodon de Unesko konvinki la registarojn pri la valoro de kulturo por aliaj homaj agadsferoj, precipe la ekonomio — kaj instigi al agado preter vortoj.

Agoroj: Neoficiala influo

La konferenco laboris je tri niveloj: pleno, forumoj kaj t.n. agoroj. En la pleno rajtis paroli la registaroj, sed ĝi ricevis ankaŭ raportojn de la forumoj kaj agoroj. La forumoj estis organizitaj de iu ŝtato, dum agoron rajtis okazigi pli-malpli kiu ajn organizaĵo. (UEA estus povinta agi tiel.) Entute surprogramis 10 duontagaj forumoj kaj 36 (ĝenerale duontagaj) agoroj. Pro la samlokeco de ĉiuj eventoj (en pluraj antaŭaj Unesko-aranĝoj NRO-j estis tenitaj for de la interŝtata renkontejoj) multaj registaraj reprezentantoj povis eskapi de la kutime tedaj paroladoj en la pleno kaj aŭskulti la multe pli interesajn diskutojn agorajn kaj forumajn. Tiel la NRO-j espreble influis neoficiale la registarajn politikojn de la mondo.

La tagon antaŭ la oficiala malfermo la NRO-j estis invinitaj por ricevi informojn, fari demandojn kaj eldiri siajn opiniojn. Mi tiam parolis kelkfaze pri la kultura valoro de Esperanto.

Post la malfermo mi partoprenis la forumon pri "unueco en diverseco". En la posta tago mi ĉeestis la temon "lingvo kaj identeco", organizitan de svedaj teatristoj, kiu estis ege interesveka pro sia multkultura komplikeco. En mallonga interveno mi substrekis ke la esperantlingva teatro konsistigas centjaran serĉadon de monda identeco. Mi trovis tre interesa ankaŭ agoron pri la kulturaj rajtoj de indiĝenaj popoloj, zorge de samea organizaĵo. Ĉi tie la registara politiko de Svedio ricevis fortan kritikon de samea partoprenanto. La trian tagon mi unue aŭskultis la debaton pri la Agadplano, kaj poste iris al agoro pri kultura plureco kaj multkultura integriĝo. Kiel oni povas kompreni el la nura nombro de forumoj kaj agoroj, mi neeviteble maltrafis la plej multajn.

La konkreta rezulto de la konferenco estas akcepto de Agadplano, distribuita kiel propono antaŭ la konferenco. Speciala grupo laboregis tage kaj nokte pri la modifoj.



Federico Mayor,
Ĝenerala Direktoro de Unesko

Foto: Unesko/Dominique Rogier

Nur la registaroj rajtis voĉdoni, sed aliaj povis influi la procedon tra registaroj — kion mi faris, sendante tri proponojn al la delegacioj de kvin ŝtatoj. Kompare kun la proponita dokumento, la fine akceptita teksto mencias "egalecan lingvouzon" en Interreto — eble, sed ne pruveble, rezulte de tiuj proponoj.

Kiel la plej grava memoraĵo restos por mi du paroladoj de ĉefoj de Unesko:

La unuan tagon la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Federico Mayor, riproĉe alparolis la registarojn de la mondo kaj akuzis ilin pri netenado de jam faritaj promesoj. Lia parolado estis forta pledo por la kreivo de la homo. "Kreivo ebligas al ni reinventi, ĉiun tagon, la manieron en kiu ni vivas". "Kreivo iras kontraŭ la vento, kontraŭ la dominanta sento, kontraŭ la ordonoj de la tago." "Nur unu frukton ni ne rikoltos: la frukton kies

semojn ni ne kuraĝis planti."

Kaj la lastan tagon la vica ĝenerala direktoro pri kulturo, Lourdes Arizpe, faris inspiran paroladon, en kiu ŝi konstatis: "Kiam vi iras al la plej profundaj temoj pri kulturo, vi alfrontas la plej kernan demandon: Kiu decidas?" Ŝi pledis por nova homa rajto: "Al la homaj rajtoj, do, ni devas aldoni la kondiĉojn de libereco de kreado. Tiu ĉi estas pli ol la esprim-libereco kaj samtempe komplemento al ĝi, ĉar ĝi signifas kapablon eliri trans la malnovajn mensajn kadrojn, por esplori novajn valorojn kaj krei novajn instituciojn." Do por ŝi ne temis pri konservo de jam atingitaj kulturaj valoroj. Kaj fine: "Kiu pensas por la mondo?" Ni esperu ke la ĉeestantaj registaroj estis influitaj de tiuj du pensigaj paroladoj.

Christer Kiselman (Svedio)

Radikala peticio

Ankaŭ "Esperanto" Radikala Asocio sendis tri reprezentantojn al Stokholmo. Ili transdonis al Federico Mayor peticion kiu rekomendas adopti Esperanton kiel ilon por protekti la minacatan lingvodiversecon. Subskribis ĝin 5000 personoj, i.a. centoj da eŭro-parlamentanoj, komponisto Ennio Morricone kaj Reinhard Selten.

Laŭ la ERA-organo *Translimen!*, Mayor esprimis rezervojn rilate al la alarmoj lanĉitaj pri baldaŭa malapero de la lingva diverseco, sed allasis ke neŭtrala internacia lingvo povas utili por protekti ĉi tiun. (ERA)

★ *Kiel vi konatiĝis kun Kalocsay?*

Prepare al la 51-a UK en Budapeŝto (1966), oni aranĝis E-kurseton por ĵurnalistoj, kiun mi vizitis. Por firmigi mian lingvoscion, mi ekkolektis Esperantajn parolturnojn. Tiam mia scio pri la E-literaturo kaj ĝiaj kultivantoj estis preskaŭ nula. Amiko Ludoviko Kökény proponis montri mian frazeologian kolekton al Kalocsay. En aŭgusto 1968 mi vizitis lin. Lia loĝdomo ankoraŭ portis vundojn mondmilitajn kaj el la revolucio de 1956. Dikaj traboj retenis la plafonojn de kolapso. En la laborĉambro de Kalocsay libroj kuŝis dise sur la planko, apud la forno, sub divano, sur seĝoj. Malnovaj jarkolektoj ŝnurligitaj kovriĝis de polvo en la anguloj. Poste mi komprenis ke ekzistas du specoj de laborĉambroj: en la unua regas perfekta ordo, en la dua malordo: en ĉi tiu oni senĉese laboras. Tiam mi ne konjektis ke la iom moroza oldulo, ĉe sia skribotablo inter papermondoj, estas la “vivanta klasikulo de la Esperanto-kulturo”. Mi eĉ nun hontas ke la unuajn fojojn mi kondukis malmode, ofte kontraŭdiris al li kaj arogis diskuti eĉ pri gramatiko.

Budapeŝta loĝejo
ordinara kaŝas trezoron,
kiun povus aliri ĉiu
esperantisto, se troviĝus
rimedoj por ĝin
alirebligi. Temas pri la
“Esperanta heredaĵo” de
Kolomano Kalocsay,
kiun prizorgas Ada
Csiszár. Ni intervjuis ŝin
en la hungara ĉefurbo.

★ *Kiel reagis Kalocsay?*

Fakte, li ĝojis klarigi al sensciulo diskutatajn temojn kiel la demando pri -ata/-ita, vortfarado ktp. Jes ja: liaj maloftaj vizitantoj pro la granda respekto ĝenerale ne estis parolemaj, ĉefe ne diskutemaj.

★ *Pri kio vi kunlaboris kun Kalocsay?*

Kalocsay opiniis ke frazeologia kompilaĵo kiel la mia helpas interpreti parolturnojn

El la lasta intervjuo kun Kalocsay

Kvar monatojn antaŭ sia morto, en oktobro 1975, Kalocsay donis intervjuon al Ludoviko Kapitány. Jen parto de liaj vortoj.

“[...] Mi vivas kiel maljunulo. [...] Mia ĉefa okupiĝo estas la zorgado pri *Hungara Vivo*, kiu — kiel mi ĝoje vidas — elluktis por si tute aŭtoritatan pozicion inter Esperantaj revuoj. La alia afero kiu multe okupis min lastatempe, estas la tiel nomata *Domfabriko*, kiun mi faris kune kun Ada Csiszár kaj kiu entenas 6 mil frazeologiajn esprimojn laŭ la modelo de la Zamenhofa *Proverbaro*. [...]”

Mi rigardas la perspektivon de Esperanto favora; se mi ne rigardus ĝin favora, tiam mi ne okupiĝus pri la lingvo. Kaj kompreneble ekzistas kelkaj fenomenoj kiuj ne estas bonvenaj en Esperanto. La esperantistoj inter si kvereladas, eble malpli [pli — *Red.*] ol tio estus favora por la movado. Sed tio ĉi jam okazis. UEA nun estas ankoraŭ UEA, se ĝi restos en unueco. Okazis jam ke UEA ne estis UEA, sed estis UEA plus IEL [Internacia E-Ligo; temas pri la periodo de organiza skismo, 1937-47 — *Red.*]. Kaj tamen la movado transvivis tiun kataklismon. [...]”

Kompreneble mi, kiel literaturisto, rigardas la ĉefan kondiĉon de la florado de Esperanto en la florado de la Esperanto-literaturo.



Ada Csiszár kun Kalocsay, fine de 1975

La prespreta manuskripto de *Omaĝe al Kalocsay* forlasis dum momento la tirkeston por fotiĝi sur tablo de Ada Csiszár.

Sed ankaŭ en la organizo kaj en la junulara movado kaj en aliaj terejoj — ekzemple en la instruado, precipe en la deviga instruado en la lernejoj — estas jam tiaj rezultoj kiuj antaŭigas la aferon de la Esperanta movado. Tamen oni neniam devas tro postuli kaj tro frue postuli ion. Tre ofte junaj aŭ novaj esperantistoj kutimas post kelka tempo malesperi kaj diri: kiel estas eble ke tiel bona afero, tiel praktika afero — mi povus diri: mondsava afero — tamen ne venkis, malgraŭ ke baldaŭ estos jam cent jaroj de tio ke Esperanto ekzistas? Nu, ĉio en la mondo iras malrapide kaj komforte, kaj oni devas kompreneble per ĉiuj niaj fortoj antaŭenpuŝi la aferojn, sed oni ne postulu tro, oni ne estu volisma [...], ĉar ties rezultoj estas plej ofte malespero kaj forlaso de la movado. [...]”



Kiel kuracisto, Kalocsay estis persone konata al pli da homoj ol kiel esperantisto.

Arĥivo de UEA

Foto: Fabienne Berthelot

datojn al supera kaj mezgrada ekzamenoj.

★ **Kial vi prizorgas la postlasaĵon? Ĉu ne plu vivas familianoj?**

Kalocsay ne havis gefratojn, ĉar lia patrino mortis kiam li havis nur du jarojn. Li edziĝis en 1929 al Margit Vangel, kaj zorgis pri ties naŭjara filino Mária, sed ne adoptis ŝin. Proprajn idojn li ne havis. Lia edzino

mortis en 1982, la duonfilino en 1995. Laŭ la deziro de Kalocsay (konfirmita en la testamento de la edzino) mi heredis la Esperanto-postlasaĵon, kun la rajto kaj devo zorgi pri la riĉa spirita heredaĵo, inkluzive la aŭtorrajtojn.

★ **El kio konsistas la postlasaĵo?**

El familiaj dokumentoj, fotoj, muziknotoj, korespondaĵoj, sonbendoj, manuskriptoj ktp. En la biblioteko troviĝas la plej gravaj E-libroj (kelkaj kun aŭtoraj dediĉoj kaj marginaj notoj de Kalocsay) kaj binditaj jarkolektoj fru-epokaj. La materialo estas aranĝita tiel ke posta gardonto (espereble Internacia E-Muzeo) ne havu kapdolorojn.

Pretas por aperigo la kompilaĵoj *Dissemitaj floroj* (originalaj kaj tradukitaj poemoj ne aperintaj en volumoj), *En superlativo...* (87 poemoj de 52 aŭtoroj, dediĉitaj al Kalocsay), *Versoj kaj melodioj* (poemoj de Kalocsay kun melodioj de renomaj E-komponistoj aŭ de Kalocsay mem), *Postrikolto* (poemtradukoj, kvazaŭ kompletigo al *Tutmonda sonoro*) kaj *En naciaj vestoj* (originalaĵoj tradukitaj nacilingven).

El la kolekto venis sunlumen libroforme: *Dek prelegoj* (1984), *Naŭ poetoj* (1989, redaktita de Kalocsay), *La dekdu noktoj*

de Satano (1990), *Diino Hertha* (1992) kaj *Versojn oni ne aĉetas* (1992).

★ **Vi laboras kun la apogo de Amika Societo de d-ro Kálmán Kalocsay.**

Ĝi fondiĝis kiel internacia societo la 30-an de nov. 1991, je la centjara jubileo de Kalocsay, daŭrige al la agado de Internacia Komitato por Honoro al K. Kalocsay, fondita en 1983. Sub la prezido de Waringhien, tiu komitato perfekte plenumis sian historian rolon, atingante i.a. instalon de Kalocsay-memorĉambro kaj de publika statueto en lia naskovilaĝo Abaújszántó kaj de memortabulo sur lia iama somerdomo.

En la societo aktivas nun 43 anoj (13 eksterlande). Ili fervoras per artikoloj, prelegoj, memorfestoj, radio-elsendoj, tradukkonkursoj, novaj dokumentoj pri Kalocsay. En 1994 estis inaŭgurita Kalocsay-memortabulo en Miskolc. Sub societa egido aperis samjare la hungarlingva memolibro *In memoriam dr. Kalocsay Kálmán*.

★ **Ĉi lasta estas kvazaŭ ekstrakto el ampleksa biografia kompilaĵo esperantlingva, Omaĝe. Kion pri ties eldono?**

De longe ĝi dormas presopreta en mia tirkesto kaj atendas eldoniston kiun ne timigas la granda amplekso. Sed mi jam pripensis aperi la materialon po partoj. Tion ebligas ĝia arango, ĉar la personeco kaj agado de Kalocsay estis tiel multifacetaj ke mi dediĉis al ĉiu faceto specifan sekcion. Ekzemple la partoj pri *Poeto*, *Tradukisto*, *Eseisto*, *Linguisto-gramatikisto*, *Movadano* ktp. taŭgas kiel memstaraj libretoj.

Kontakt-adreso: Amika Societo de D-ro K. Kalocsay, p/a Ada Csiszár, Zsigmond tér 1/b, HU-1023 Budapeŝt, Hungario.

de la propra lingvo. Li konsentis komune daŭrigi la kolektheadon. Dum tiu kvinjara laboro amikiĝis ankaŭ niaj familioj, kaj la esprimaro *Domfabriko* aperis en 1975.

Pro mia insisto Kalocsay en 1975 konsentis listigi siajn verkojn aperintajn en diversaj revuoj. Propramane li plenigis 180 slipojn. Tiam malkaŝiĝis ke krom la konataj plumnomoj — Kopar, C. E. R. Bumy, M. Alice Pik, Alex Kay, la postmortaj Ista Makler kaj Emiano Imby — li uzis ankaŭ pluajn, kiuj eĉ hodiaŭ bone kamuflas lin.

Pro la forpaso de Kalocsay ne realiĝis komencita libro, kiu celis helpi kandi-

Gustumo el Kalocsay

La dekdu noktoj de Satano. "Emiano Imby". Prilly: LF-koop, 1990. 130p. 21cm. Poemciklo erotika. 49,80 gld.

Dek prelegoj. Budapeŝto: HEA, 1984. 126p. 20cm. Pri movado, lingvo, literaturo. 13,80 gld.

Diino Hertha. Editoris Ada Csiszár. Chapecó: Fonto, 1992. 72p. 21cm. Noveloj. 12,00 gld.

Izolo. Rotterdam: UEA, 1977 (repr.). 80p. 17cm. Bind. Poemaro. 16,50 gld.*

Naŭ poetoj. Red. Kalocsay. Saarbrücken: Illtis, 1989. 74p. 21cm. Antologieto, kies aperon sistempe malebligis la mondmilito. 33,60 gld.

Reĝo Lear. Shakespeare. Trad. Kalocsay. Rotterdam: UEA, 1966. 160p. 15,00 gld.*

Somermeznokta sonĝo. Shakespeare. Trad. Kalocsay. La Laguna: J. Régulo, 1967. 99p. 19cm. 9,00 gld.*

La tempesto. Shakespeare. Trad. Kalocsay. La Laguna: J. Régulo, 1970. 119p. 19cm. 9,00 gld.*

Tutmonda sonoro. Red. V. Benczik. Budapest: HEA, 1981. 664p. 20cm. Bind. Du volumoj. 581 poemoj de 185 poetoj, ĉefverko de la traduka beletro en Esperanto. 66,00 gld.

Versojn oni ne aĉetas. Vieno: Pro Esperanto, 1992. 64p. 23cm. Poemoj. 24,00 gld.*

*Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

ILEI sojle de jubileo

La estraro de Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj kunvenis dum kvar duontagoj (6-8 marto) en Prago.

De maldekstre:
Marija Belošević,
Stefan MacGill,
Bertil Andréas-
son kaj Atilio
Orellana Rojas;
UEA-observanto
Renée Triolle.



Foto: Petro Cirdine

En multe da diskuto naskiĝis kelkaj interesaj decidoj, pluraj el ili ligitaj al jubileoj:

ILEI uzos novan simbolon, desegnititan de Stefan MacGill: ĝi videblos en la diversaj eldonaĵoj de la Ligo.

Same la ILEI-organo *Internacia Pedagogia Revuo* kiel la porinfana *Juna Amiko* (vd. jan., p. 16) festos sian 25-jariĝon: per specialaj numeroj, 1999/1 resp. 1998/3 (septembro). Ambaŭ aĉetos kun kolora kovrilo.

ILEI mem jubileos venontjare: la konferenco solenanta la 50-jariĝon okazos post la Berlina UK, en Karlovy Vary (Ĉeĥio).

Por honora membreco de ILEI estis proponita Nora Moerbeek, kiu forpasis kelkajn tagojn poste (vd. nekrologon en apr., p. 80).

Altnivela trejnado de Esperanto-instruistoj devas okazi kun pli granda elano ol ĝis nun. Kiel konate, ILEI organizos kadre de Kampanjo 2000

internacian metodikan seminarion por Esperanto-instruantoj: jam multaj anonciĝis por dusemajna programo gvidota de Duncan Charters kaj Katalin Smidéliusz (20-31 julio, Grésillon, Francio).

La estraran kunvenon aranĝis la agentejo KAVA-PECH (vd. jul.-aŭg. '97, p. 136). Biergustumado en fam-etosaj Pragaj bierejoj malstreĉis la labor-etoson.

(Laŭ diversaj fontoj)

Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI en 1997

El la raporto de mag. Atilio Orellana Rojas, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono (IEK):

Okaze de la UK en Adelajdo estis aprobita la konsisto de nova IEK. Iom poste prof. ZHANG Danchen el Ĉinio rezignis, kaj liajn taskojn transprenis d-ro Paul Gubbins el Britio kiel vicprezidanto de IEK kaj d-ro Venkata Ranganayakulu el Bharato kiel reprezentanto por Azio.

Dum 1997 okazis 9 sesioj en 8 landoj (Albanio, Argentino, Aŭstralio, Britio, Ĉeĥio, Ĉinio, Togolando kaj Ukrainio) kun entute 47 kandidatoj el 12 landoj, el kiuj 32 sukcesis.

urbo, lando, monato	kandidatoj		devenlandoj	sukcesis	
	elemente	meze		elemente	meze
Tirana, Albanio, marto	11	2	AL	7	2
Wuhan, Ĉinio, junio	2	2	CN	2	2
Kievo, Ukrainio, julio	1	2	RU, UA	1	2
Adelajdo, Aŭstralio, julio	3	3	AU, FR, NP, US	1	3
Lara, Aŭstralio, julio	—	1	AU	—	1
Barlaston, Britio, aŭgusto	—	1	GB	—	1
Lomé, Togolando, aŭgusto	10	—	TG	2	—
Bonaero, Argentino, oktobro	5	—	AR	4	—
Skokovy, Ĉeĥio, novembro	—	4	CZ	—	4

Kontrakto inter ELTE kaj KCE

La 28-an de marto en La Chaux-de-Fonds (Svislando)



la tiea Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj Universitato ELTE de Budapeŝto subskribis kontrakton. Ĉi-okaze gastis en La Chaux-de-Fonds d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits, gvidanto de la Esperanto-fako, kaj prof. Tamás Gecső, estro de la katedro pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, en kies kadro la E-fako funkcias. Laŭ la kontrakto diplomitoj de KCE povos aliĝi al la internaciaj E-kursoj de ELTE sen apartaj studtitolaj postuloj, kaj KCE estos konstante konsultata de ELTE pri la studprogramoj, nehun-garaj gastprofesoroj ktp. de ties E-fako. (Ĉe la domparo)

Katedro kreas sensacion


La unua profesoro pri interlingvistiko kaj esperantologio en Nederlando, d-ro Marc van Oostendorp (vd. nov. '97, p. 181), okupis sian katedron en Amsterdamo la 9-an de aprilo.

En Nederlando multaj universitataj katedroj estas okupataj de t.n. “specialaj profesoroj”. Temas pri fakoj kies kostojn tute aŭ grandparte transprenas ekster-universitata institucio aŭ kompanio. Ĉi tiuj tamen ne povas laŭplaĉe “mendi” katedron pri iu ajn temo, ĉar la universitatoj zorge kontrolas kaj garantias la sciencan nivelon.

La influa ĵurnalo *NRC Handelsblad* artikolis en marto pri la multiĝo de tiaj katedroj, laŭ ĝi ofte senutilaj, kaj ekzemplis i.a. ĝuste per “la homo kiu en la Universitato de Amsterdamo instruos Esperanton al la studentoj”. “Mi ne certas pri kiu temas, en mia kontrakto staras nenio pri lingvo-lecionoj” — ripostis van Oostendorp dum la inaŭgura ceremonio de la katedro, en sia parolado (kies nederland-lingva teksto aperis broŝure kaj estas trovebla ĉe <http://www.euronet.nl/users/oostendo/oratie/>), antaŭ pli ol cent universitatanoj kaj esperantistoj.

Fakte, la nova profesoro ambicias pli alte pri sia posteno: “mi esperas ne nur ke ĉi tiu katedro ekzistos dum longaj jaroj, dum multaj generacioj, sed ankaŭ ke kun la paso de la tempo ĝi povos esti plilarĝigita”. Tion pravigus la graveco de la esploroj kiujn li antaŭvidas: pri la lingva normo en Esperanto, pri ties stiltavoloj kaj regionaj diferencoj, kaj pri aliaj sociolingvistikaj temoj, el kiuj la plej grandan signifon havas probable propeŝtiko: espere, van Oostendorp estros ankaŭ la planatan eksperimenton NEIGHBOUR (vd. apr., p. 69).

Pri la inaŭguro de la nova katedro en Amsterdamo ekatentis pli da amaskomunikiloj ol pri kiu ajn Esperantorilata evento en la lastaj dek jaroj. La nova profesoro estis intervjuita de tri tutlandaj ĵurnaloj, kaj teksto de gazetara agentejo aperis en multaj gazetoj lokaj. Liaj radio-intervjuoj nombris 8,



**Gratulantoj
vicis por saluti
d-ron Marc van
Oostendorp
(maldekstre).**

el kiuj 3 daŭris pli ol 20 minutojn. Kvar televidoj invitis lin al intervjuo aŭ debato; lige al unu el tiuj Wereldomroep, kanalo por nederlandanoj vivantaj eksterlande, venis filmi eĉ en la Centra Oficejo kaj en la hejmo de via redaktoro, por ilustre montri kiel funkcias Esperanto en la ĉiutaga vivo.

La nova redaktoro de LPLP

D-ro van Oostendorp promociiĝis ankaŭ al alia funkcio interlingvistika. Post zorga esplorado, la redakcio de *Language Problems and Language Planning* (LPLP) elektis lin kiel novan redaktoron post la eksiĝo — pro okupateco profesia — de d-ro Klaus Schubert, redaktinta la revuon ekde 1990. Van Oostendorp fariĝis membro de tripersona redakcio, ĉesulte kun d-ro Probal Daŝgupto kaj Humphrey Tonkin. Aliaj anoj de la LPLP-teamo estas d-roj Renato Corsetti kaj Mauro La Torre, nove elektitaj kiel recenzaj redaktoroj por Eŭropo, d-ro Frank Nuessel (recenzoj por Nord-Ameriko) kaj Mark Fettes (interlingvistika rubriko). LPLP estas eldonata de la prestiĝa Amsterdama eldonejo Benjamins, kunlabore kun Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

István Ertl

Faktoj pri la IJK

La 54-a Internacia Junulara Kongreso (Rijeka, 25 jul. - 1 aŭg.) havas Altan

Protektanton: s-ino Katica Ivanišević estas prezidanto de Universitato de Rijeka kaj de unu el la ĉambroj de la kroata parlamento. La urbestro de Rijeka, Slavko Linić, anoncis financon subtenon al IJK. La amaskomunika aŭspicianto fariĝis la loka ĵurnalo *Novi List*. La Rijeka enigmorevu *Feniks*, dusemajna, ekde marto publikigas Esperanto-kurson de Spomenka Štimec, en 12 lecionoj. Kroata Poŝto eldonas telefonkarton dediĉe al la kongreso, desegnitajn de Tea Janković, la nova prezidanto de

Kroata E-Junulara Asocio. Por helpi la preparlaborojn, ĝi ankaŭ donacis por faksilo de la organizanto KEJA (Amruševa 5, HR-10000 Zagreb) la lineon +385/1/481-70-67, funkci-

ontan ĝis la IJK.

Kroataj Fervojoj disponigos specialan vagonon kun 60 lokoj por senpaga veturo de Zagreb ĝis Rijeka. (Rezervu ĉe KEJA.)

Sian 60-jariĝon festos TEJO en Rijeka: pri ĝia

historio parolos iama prezidanto de TEJO, Ivo Osibov, nun profesoro pri juro en la Universitato de Split.

La IJK kaj la UK estos kunligitaj per aŭtobuso Rijeka-Montpeliero.

La repaĝaro de KEJA ricevadas rekordan kvanton da vizitoj: <http://pubwww.srce.hr/keja>.



La plej verdaj verduloj

La pli ol 230 membroj de Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) parolas Esperanton kaj difinas sin kiel verduloj (parte anoj de verdaj partioj) aŭ kiel engaĝitoj pri ekologiaj, socialaj, pacaj kaj viv-rilataj temoj.

Ni pensas tutglobe kaj agas surloke. Ni celas informi niajn politike verdajn geamikojn pri la avantaĝoj de Esperanto kaj niajn esperantistajn geamikojn pri la neceso de politiko konsideranta ekologion. Nia okpaĝa bulteno *AVENO* aperas dufoje jare (ankaŭ: <http://www.comlink.apc.org/ave/welcome.htm>) kun informoj pri verdaj partioj, diskutataj programpunktoj (ekz. ekologiaj impostoj) kaj informoj pri ekologiaj temoj pozitivaj kaj negativaj. Aktualaj konsilioj rilatas al daŭrigebla konduto, ekz. rilate energi-uzadon. Por pli grandaj artikoloj ekzistas la ekologiisma revuo *VERDIRE*, redaktata de Daithí Ó hÉalaithe (54 Páirc Éabhóra, Beann Eadair, Co. Bh.A.C., Irlando; verdire@hotmail.com): kvar sinsekvaj n-roj estas aboneblaj per 25 gld. al la UEA-konto "vrdr-d".

Komunaj agadoj enkadre de AVE estas: protekti bestojn, ekz. preventi torturajn transportadojn; helpi kontraŭ la sekigo de Aral-Maró en Centra Azio; subteni projekton de organika agrikulturo kaj plibonigo de la vivo-kvalito apud Nukus (Uzbekio).

Ekzistas pli ol 230 AVE-membroj sur 5 kontinentoj. Por membriĝi al AVE oni ne bezonas esti membro de verda partio, sed ja necesas akcepti niajn formulitajn celojn kaj la verd-politikan filozofion. Regula kotizo ne

ekzistas, sed eblas kontribui per donacoj — kaj per informoj el la hejmlandoj de la membroj. AVE kunlaboras kun UEA, SAT, kaj kun diversaj neesperantistaj organizaĵoj kiel Eŭro-

dank' al Kaija el Finnlando mi ne estis sola; ni informis pri AVE kaj ĝenerale pri Esperanto per kelkaj libroj. Informilojn en la angla kaj finna lingvo kaj adresojn de baltiaj Esperanto-asocioj ni disdonis. Ni ricevis plurajn pozitivajn reagojn. Bedaŭrinde ni ne trovis vojon diskutigi la kontraŭulojn antaŭ nia tagorda punkto.

La diskuto montris ke estas neklare ĉu organizaĵo kiel AVE povus iĝi observanto, kaj ĉu AVE-anoj estas unuarange esperantistoj aŭ verduloj. Patrinlingvanoj de la angla (el Irlando) diris ke ili sentas sin malkomforte, ĉar multaj delegitoj havas problemojn espri-



Verdegaj estas ankaŭ tiuj ĉi papagidoj, kiuj atendas, en brazila zoologia ĝardeno, esti redonitaj al la arbaro, de kie mon-avidaj bestoŝakristoj forkaptis ilin.

Foto: Clay Magalhães

pa Federacio de Verdaj Partioj (EFVP), kies gvidliniojn ni tradukis al Esperanto. Krom renkontiĝo kadre de la UK en Montpeliero ni organizas en proksima loko seminarion pri verda politiko (9-11 aŭg., Larzac).

Por kaj kontraŭ Esperanto

AVE ekde sia fondiĝo en 1984 partoprenas en la kongresoj kaj konsilioj de EFVP, kiu uzas preskaŭ nur la anglan lingvon, pro manko de mono por tradukservoj.

Sur la tagordo de la lasta EFVP-konsilio en Helsinko, fine de marto, estis punkto ĉu AVE estu akceptita ankaŭ formale kiel observanto ĉe la Federacio. (AVE ne povas iĝi membro, ĉar ĝi ne estas partio.)

Pro tio mi vizitis la konsilion; kaj

mi sin sufiĉe klare en la angla. Fine, pozitive reagis 30% de la voĉoj, plejparte el malgrandaj landoj (ekz. Kartvelio kaj Irlando); do, ni ne sukcesis (devus esti 66% por). Mi interkonsentis kun la ĝenerala sekretario de EFVP, Ralph Monoe, daŭrigi la neformalan kunlaboron kiel antaŭe.

Poste en Varsovio mi povis diskuti kun pluraj verdaj eŭro-parlamentanoj, okaze de ilia konferenco. Germain Pirlot ja bone kolektas E-subtenantojn inter la EP-anoj (vd. okt. '97, p. 165): pluraj verduloj estas por Esperanto — sed bedaŭrinde kelkaj forte kontraŭ.

Manfred Westermayer, sekr. de AVE (Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelsingen, Germanio; [+49/761/584-854](tel:+49761584854);

m.westermayer@3landbox.comlink.apc.org)

*Ame kaj klere
verkita klasikaĵo:*

Vivo de Zamenhof

(1920)

de Edmond Privat

134 p. 18 cm.

Bind. 18,90 gld.

Triona rabato ekde tri ekz.

Reagoj



Pri la kataroj

Ne herezo, ja religio

Vi ŝanĝis la titolon de mia artikolo “La katarisma religio” (feb., p. 27) al “La katarisma herezo”. Sed *herezo* ĉiam subkomprenas *doktrinion eraran, minoritatan, prave kondamnitatan*. Mi montris ĝuste tion ke katarismo ne estis simpla variaĵo de la kristana kredo, do kristana herezo, sed memstara religio, fundamente ne kristana. Ĉu vi dirus ke judismo estas kristana herezo? aŭ kristanismo — juda herezo? Certe ne. Same, katarismo ne estis herezo, sed *religio* alia ol kristana.

Mi insistas pri tio, ĉar nuntempe multaj personoj klopodas alproprigi katarismon al kristanismo, kun la celo pravigi la Roman persekutadon.
André Cherpillod (Francio)

Evidente kristanoj

La kataroj evidente estis kristanoj, sed kelkfoje eĉ evidentaĵoj bezonas pruvon. Ĉu “la kataroj nomis sin mem *kristanoj*”, kiel rekonas A. Cherpillod, *nur ĉar* “tiutempe la nomo *nekristano* signifis proksimume ‘pagano, malpiulo...’”? Certe ne, ĉar ili eĉ sentis la bezonon precizigi ke ili estas “bonaj” aŭ “veraj” kristanoj, vidante ke multaj tiamaj katolikoj fakte estas malpiuloj, kvazaŭpaganoj.

La du ĉefaj preĝoj de la kataroj estis *Patro nia*, la preĝo instruita de Jesuo mem al liaj disĉiploj, kaj *Adoremus*: “Ni adoru la Patron kaj la Filon kaj la Sanktan Spiriton”. Ili ĉerpis siajn instruadon kaj vivmanieron el la kristanaj skriboj. La kataroj estis kristanoj antaŭ ol esti dualistoj.

Cherpillod identigis iom tro rapide romkatolikismon kun kristanismo mem. Ŝajnas al mi tute nekomprenebla kial li “klare” atribuas al “multaj historiistoj” la strangan celon senkulpigi la Roman eklezion per la aserto ke la kataroj estis ne alireligianoj sed malbonaj kristanoj kaj “sekve, oni persekutis kaj mortigis ilin tute prave”. Kial tia

suspekto pri plejparto de la nuntempaj historiistoj?

Christian Lavarenne (Francio)

La limoj de kristaneco

André Cherpillod reagas:

Ĉu oni povas nomi *kristanoj* homojn kiuj asertis ke ne Dio kreis la mondon, ke Jesuo ne estas la filo de Dio, ne naskiĝis, ne mortis sur la kruco kaj ne savis la homaron, ke eŭkaristio valoras nenion, ke la Virgulino neniam ekzistis kaj estas nura simbolo, ke la animoj transmigradas? Jes. Sed en tiu kazo *la tuta bomaro*, inkluzive de la budhanoj kaj animistoj, konsistas nur el kristanoj.

Pri la okcitana

Ĉu Esperanto politikumu?

La artikolo de D. Pfeiffer pri la okcitana lingvo (feb., p. 29) ŝajnas skribita pli de politika aktivulo ol de kompetenta fakulo. La enveno de nordfrancoj en Puatuo, antaŭe okcitanan, estas nura teorio malakceptita, kiom mi scias, de la plejparto inter la historiistoj. Pfeiffer fariĝas ankoraŭ malpli kredinda kiam li situigas en Okcitanujo la vilaĝon Villers-Cotterets, kiun oni fakte trovas nordoriente de Parizo!

Estus tro longe pluki ĉiun eraran detalon: Mistral ricevis la Nobel-Premion en 1904, ne en 1905, kaj la ribelo de la vinberistoj okazis ne “samjare”, sed en 1907, ktp ktp. Tiuj detaloj montras kiel malserioze la artikolo estis verkita. Ĝi eble taŭgus en politika revuo, legota de incitendaj fanatikuloj, sed ĉu ĝi havis sian lokon en la revuo *Esperanto*?

Bernard Aunis (Francio)

Pli da lernantoj okcitan-lingvaj

Pfeiffer mencias 500 infanojn en la bazlernejoj de la asocio Calandreta. Laŭ *Le Monde* (4 feb.), la ĉi-jara nombro de lernantoj en la lernejoj prizorgataj de Calandreta estas 1320.

Pfeiffer skribas: “Baldaŭ sekvos eĉ mezlernejo”. En pasinta septembro jam malfermiĝis la unua okcitan-lingva mezlernejo, Collège Leon Còrδας, sude de Montpeliero, kun du klasoj. Se ĝi prosperos, baldaŭ estos eble en Okcitanio atingi la abituriantan nivelon laŭ dulingva vojo.

Jorj Abherve-Gwegen (Francio)

Malpreciza mapo

Sur la mapo de la okcitana lingvujio same grizaj aperas la lingvoj kataluna (vere proksima al la okcitana) kaj francaprovencan. Ĉi tiu multe pli proksimas, vortare kaj gramatike, al la franca ol al la okcitana: la griza koloro erarige donas la impreson ke ĝi estas okcitana dialekto (aŭ parenca lingvo).

“Duono de la loĝantaro komprenas ĝin [la okcitanan] kaj triono kapablas ĝin paroli”: ne plu, ĉar (laŭ la okcitana gazeto *La Setmana*, 19 feb.) inter 1990 kaj 1997 la nombro de komprenkapabluloj regresis de 48% al 34% de la loĝantaro, kaj la parolkapabluloj regresis de 28% al 19%. Necesas substreki la zorgigan fakton ke duono de ĉiuj tiuj kapablas nur kompreneti aŭ paroleti.

Robert Pontnau (Francio aŭ Okcitanio)

Kulturriĉa lingvo ja helpendas


Daniel Pfeiffer reagas:

Mi estas nur privatulo lerninta la belan lingvon de la kongresa lando. Miajn informojn mi ĉerpis el diversaj fontoj, ofte ne sciencaj. Ekzemple, pri Puatuo mi legis ke pro pesto formortis la loĝantaro, sed neniam ke oni pridubas tion. Pri 1905 mi fakte mismemoris, sed tio ne forprenas de la okcitana ĝian literaturan Nobel-premion, nek faras el mia artikolo senfunda politikaĵon.

Se sur mapo du disaj regionoj havas saman koloron, tio ne signifas samecon. La frankoprovenca estas ja parenca kun la okcitana, iel meza formo inter tiu kaj la franca, al kiu ĝi similas i.a. fonetike. La nova statistiko ja estas timiga, kaj ĝi pravigas la provegon helpi tiun kulturriĉan lingvon. Ke miaj malnovaj ciferoj pri Calandreta-lernejoj rapide tiom altiĝis, estas esperige, tamen nur guteto en oceano.

Red.: Per tio ni finas la debaton pri la rilato de katarismo kun kristanismo kaj pri la okcitana lingvo.

Recenzoj



Regis Poezio, kaj Amo okupis tronon

Lirikaj perloj de Al-Andalus. Antonio Marco Botella (1921). Zaragoza: Fundación Esperanto, 1995. 327p. 21cm. Ilus. 28,80 gld.

La muzulmanan Hispanion (711-1492) senvaligas antaŭ ni Antonio Marco Botella, antologiinte la fascinoplenan, arablingvan poezion de Al-Andalus, prifabelita kaj gracoriĉa lando situanta, mezepoke, en la ibera

la al-andalus liriko araba kaj hebrea, kiu iĝis memstare brilanta kulturaŝtro en iu sombre mezepoka Eŭropo, kie nur ĉe monaĥejoj oni klopodis flegi kaj vivteni la lumon de scio kaj beletro.



Foto: *Lirikaj perloj de Al-Andalus*

traktatoj, laŭ la tradicia poemformo *kasido*, kun metro konsistanta el oksilabaj versoj trokeaj, aŭ el dekseksilaboj kun forta cezuro versomeza. Malgraŭ la ofte fajna kaj precioza metaforado kaj la elegante eferveska esprimivo, tiu regula, trokea skandado oksilaba iel monotonigas la legadon, kiun bonŝance iom diversigas la biografiaj kaj anekdotaj informoj. Spite la alirojn plej diversnuancajn al reaperanta temo pri amo kaj amoro, virinĉarmo kaj vinallogo, amsopiroj kaj diboĉaj noktoj sub lunbrilo, ni fine eltiras la impreson ke la homa sopiremo al amo kaj vivĝuo estis, eĉ tiam, konstanta plurjarcenta poeta gurmaĵo kamuflita per eksterordinare virtuozaĵaj, konĉertaj variacioj.

Tiun valoran antologion bedaŭrinde makuletas, tie kaj jene, pluraj pekoj kontraŭ la akuzativo kaj refleksivo, kiuj ne ĉiam aspektas plumeraroj, kvankam foje aperas sampaĝe kaj ĝusta kaj erara frazo samspeca. Kelkaj leksikaj malgлатаĵoj jen kaj jen surfaciĝas en la cetero simpla kaj informcele flua prozo de Botella. La poemtradukoj evidentigas sveltan, elegantan prozodion kun inventoriĉaj, lirikaj solvoj, kiuj pardonigas iujn torditajn kunmetojn evitindajn. Kion signifas, ekzemple, *nigrohoroj* kaj *hel-aŭroro*, se ne "horoj el/de nigro" kaj "aŭroro el/de helo"? Pli rigora editorado povintus forigi tiajn ombrojn en cetero lume fascina libro priokupanta landon "kie regis Poezio, kaj Amo okupis tronon".

Nicolino Rossi (Italio)

duoninsulo, kunfandejo de tri gentoj: la araboj, la hebreoj kaj la berberoj. Ili ĉiuj kunflorigis la mirindan civilizacion de Al-Andalus, kies multnombraj kaj elstaraj poetoj, filozofoj kaj verkistoj pivote ariĝis ĉirkaŭ la tiamaj splendaj kortegoj kaj kalifejoj en Kordovo, Seviljo, Granado, Zaragozo kaj aliloke, tie puŝante sian poemkreivon al briloj de neimagebla rafino.

Dum la tradician, araban lirikon orientdevenan ecis la belege sovaĝaj dezertobildoj, la hebrean poezitradicion ŝirmis la religi-rita heredaĵo, kaj la kristan-latinan poezion jam dekadencan enfermis klostroj kaj ermitejoj, vastaj popoltavoloj jam paroladis romanlingvon kaj poezimembris tiuidiome. El tiuj lingvaj-kulturaj kondiĉoj greftiĝe kreskis kaj disfloris

Laŭdindas la eksterordinara klopodo de A. M. Botella malfermi por ni fenestron al tiuj altvaloraj trezoraĵoj lirikaj, preskaŭ nekonataj, kiuj siatempe certe pozitive kaj ĉeradike influis niajn eŭroplandajn kulturojn, ĉe la renesanca tagiĝo. Klare evidentas la influoj kiujn tiuj arablingvaj poetoj transigis eĉ al Danto (1265-1321), kies ĉefverko *Dia Komedio* montras strukturon ne etajn kontaktojn kun la verko *Epistolo* de la al-andalus, eminenta poeto Ibn Ŝuhayd (992-1035), priŝkribanta vojaĝon al Paradizo, kie li, trovinte nombron da renomaj poetoj, kritike analizas ties verkojn.

Ĝinde legeblas la preskaŭ okjarcenta, enlibrigita poemproduktado priama, priflora, Bakka kaj erotika de tiuj bardoj siatempe verkantaj en la klasika lingvo de protokoloj kaj

Arno kun ranoj

Urno kun runoj. Meva Maron. Chapecó: Fonto, 1996. 96p. 21cm. 19,80 gld.

Laŭdifine *Urno kun runoj* konsistas el du poemaroj samaŭtoraj, nome *Vi-burno* kaj *Damaskaj prunoj* (elementaĵo, kara Watson). Sed ne demandu min pri la origino de ĉi tiuj du titoloj: neplenumebla tasko ĉe Meva Maron, kiun la plimulto suspektas avataro de Kris Long.

Kiel Long, (ankaŭ) Maron asimilis kaj transcendis Parnasan Gvidlibron, kune kun tre diversaj poetikoj (kimra, ukraina ktp). Ĝi (li?) mastras la Esperantan metrikon, la uzadon de rimoj



Diboĉo intriga kaj leksika

La maljunulino kiu paŝis en la maro (1988). San-Antonio (ps. Frédéric Dard, 1921). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. [Paris]: France-Espéranto, 1996. 349p. 18cm. 49,50 gld.

En nia literaturo ne multas la tradukoj el bonaj nacilingvaj romanistoj de la nuntempo. Jen kial mi ĝoje salutas ke la paro LeQuint-Le Puil plenumis ege malfacilan taskon: ili tradukis unu el la krimromanoj de San-Antonio, furora aŭtoro en Francio.

Mi devas tamen konfesi miajn antaŭjuĝojn, interalie pro la bombastaj deklaroj de la aŭtoro: “Mi karieradis per vortprovizo de 300 vortoj. Ĉiujn aliajn mi inventis.” (Blufa nekredindaĵo.) Ankaŭ pro lia blagemo: “Kiam oni ĉion kapablas, nepras tion pruvi.” (Ĉu li sin taksas Dio?) Tamen, kiel ajn estas, Dard verkis pli ol 300 romanojn, venditajn en ĉ. 150 milionoj da ekzempleroj entute!

Mi ne enbias la ge-Lepuilojn, kiuj aŭdacis alfronti la defion de tia traduko. Certe nur vortaristo povis tion fari: eltrovi Esperantajn ekvivalentojn por 15 000 inventitaj vortoj. Kiom la tradukintoj adekvate sukcesis, mi ne povas ekzakte juĝi, ne konante la originalon. Sed nepre veras ke en la traduko abundegas nekomunaj vortoj, personaj inventaĵoj, derivaĵoj, kunmetaĵoj k. s. La tradukintoj diboe — plej ofte plentrafe kaj elvokive — ekspluatis la senfinan flekseblecon de

Esperanto. Mi ŝatus scii kiom da radikoj la libro entenas; certe milojn. Tio igis min, malklerulon, preskaŭ ĉe ĉiu paĝo konsulti plurajn vortarojn. Pro tio la verko taŭgas por dezirantoj riĉigi sian vortostokon, verŝajne ne por komencantoj.

Sed kia la roman-intrigo?

La rakonto estas ŝoke nigra, ekstreme senpruda, blasfeme fiparola, decide malmorala, eroti-kema ĝis pornografio. Temas pri mal-junega aventuristino, kiu riĉiĝis pere de lukraj edzigoj, sed ankaŭ pro ĉiuspecaj ĉantaĝoj, trompoj, ŝteloj. Antaŭ ol abdikii pro kadukeco, ŝi altrude adoptas kiel heredonton bel-aspektan junulon kaj instruas lin pri ŝtelarto.

La romanvefto estas sendube interesa, surprize eventoriĉa, kun pluraj neantaŭimageblaj evoluoj, kiujn konsilindas ne malkaŝi al legonto. La plej aprezinda aspekto de la verko estas la dialogoj. La oldulino regule elsputas havenŝargistan slangon, kie insultoj, sakroj kaj diverstipaj trivialaĵoj kolorriĉe svarmas. Kaj ĝuste tie,



laŭ mi, la tradukintoj senbridigis sian fantazion. Tiom ke la libro liveras la plej riĉan kaj bunte nuancitan leksikonon de tabuaj vortoj. Kompare, la ĝis nun aperintaj kolektoj fariĝas kva-zaŭ katekismaj gvidiloj. Pro prudemo mi ne ekzemplas; legu la libron.

Fine la negativaj notoj. Kiel dirite, neologismoj kaj maloftaj vortoj grandkvantas. La plej multaj estas brile elpensitaj, sed pri kelkaj mi iom dubas. Ekzemple: mi ne certas ke nesciantoj de la franca unualege komprenos *odekolono* (fakte “Kolonja akvo”). Krome multas la nomoj de diversaj “famaj” francaj firmaoj aŭ produktoj, kiuj estas famaj eble nur en Francio. Mi ankaŭ skeptikas pri la transitiva uzo de *ĵaluzi*, *ambli*, *suri*, *rajdi*. Mi ne tre ŝatis ke pri seksorganoj (ĉu estas permesite diri *kaco* kaj *piĉo*?) plej ofte uzataj estas la plej maltaŭgaj: *bito* (el kiu lingvo?), *vosto* (ĉu francismo?) kaj *etgroto* (?).

Mia tute persona agaciĝo fontis el la malkovro ke mi loĝas apud interpunkcio (la Koma Lago).

Sume, la libron mi varme rekomendas al kiu ajn: intereso, instruo, inventoj, allogo larĝe superas la (pokajn) truetojn. Nur, eble, Kalocsay sugestus ke ĝi ne konvenas por fridpisuloj.

Aldo de' Giorgi (Italio)

kaj aliteracioj, sed por spuri la enhavon necesus helpo de l' ĉashundo de la Baskerviloj. Por ekzemplo, jen la sufiĉe karakteriza poemo “Memore pri 13a de Decembro” (p. 50):

*Fabel': irlandanin' englutis
frambarmeladon — sen substrat',
vazplenon! — vundojn superŝutis
sen grundo ĉar... ĉar mortis frat'.
Alian 4an de septembro
(ne: 9an) mortis en Lublin'
Jozef' Ĉehoviĉ, mia membro.
Mi estas mem dublinanin'.*



Uf! La spasma stilo, kaj la indiko “mia membro”, povus pensigi pri poemo de Piĉ, sed mankas ties ĉi klaro kaj eleganto. Ni legu nun la aŭtoran noton (enestas en la libro pli da notoj

kaj klarigoj ol en la plena verkaro de Silber):

Fabelo irlandana — sed konata dank'al Simone Weil. Fratino manĝis tutan poton da ĉar frato mortis. “Sen substrat’”, t. e. sen rostita pano (ho ve, kion oni faras por rimo!). Por legontoj de l' 22a jarcento mi klarigu, ke la datoj estas tiuj de l' nazia invado de Pollando (la sovetia venis poste) en 1939 kaj komenco de “milita stato” en 1981. Pri Ĉehoviĉ [la plej granda pola avangarda poeto] legu poste. La 4an de septembro mortis Vasil Stus (vidu “Viburnon”) en Perma koncentrejo 36-1.

Probable ankaŭ la noto bezonas plian noton, kaj tiel senfine. Kalocsay skribis ke la rimo bela ne povas esti “vorto altirita ĉe la nazo, / sed nur

esenca parto de la frazo”, tamen Maron ripetas sian pretekston en almenaŭ ok okazoj. Tial ke plej ofte la enhavo montriĝas bagatela aŭ banala, aŭ ekstreme kriptaj kaj esotera, kaj ke Maron uzadas preskaŭ nur unu strofon, la rezulto iĝas peza kiel kaĉalota kolbaso. Eble aliaj, kiel Ŝtimec, ĝuos la verkon. El ĝi mi savus nur unu poemon, la sekvan:

*Eliri frumatene
por aŭskulti ranojn*

Jorge Camacho (Bruselo)



UK Ĝis la 20-a de aprilo al la Montpeliera UK (1-8 aŭg.) aliĝis 2502 personoj el 62 landoj.

Ŝako japana kaj tutmonda

Ŝakaj pozicioj (Vol. 1). Streĉaj momentoj el partioj luditaj vaste en la mondo en 1995. Reykjavík: Plekto, 1997. 64p. 30cm. Ringe bind. 27,00 gld. **Invito al japana ŝako.** Ueda Tomohiko. Tokio: Esperantista Klubo de Japana Ŝako, 1996. 70p. 21cm. 12,90 gld.

Ŝakaj pozicioj konsistas el artikoletoj de la islanda grandmajstro Margeir Pétursson, aperintaj en la ĵurnalo *Morgunblaðið* kaj tradukitaj de Pétur Yngvi Gunnlaugsson.

Tre koncizaj komentoj kaj nur po unu diagramo por ĉiu partio ebligas ke 60 paĝoj A4-formataj enhavas 273 partiojn. Pli interesus, almenaŭ nin malpli fortajn ŝakistojn, kolekto de malpli da partioj, elektitaj laŭteme kaj klarigitaj pli profunde.

Kiel la tradukinto konstatas, dum la lastaj jardekoj preskaŭ ne aperis libroj pri ŝako en Esperanto. Tial la ja ekzistantaj ŝak-terminoj ne estas vaste konataj inter la multaj esperantistoj kiuj ŝakludas sed ne aktivis en Esperanta Ŝak-Ligo Internacia. La libro bedaŭrinde ne helpas pri la reganta konfuzo: ne eblas scii kiuj el ĝiaj terminoj estas ĝenerale uzataj kaj kiujn la tradukin-

to elpensis. (Li mem konfesas ke li ne havis aliron al pli fruaj esperantlingvaj ŝak-tekstoj.) La lingvaĵo estas sufiĉe bona, krom kelkaj landnomaj fuŝoj



kaj multaj misliterumoj en rusaj nomoj.

Japana ŝako (*ŝogio*) estas proksima parenco de la ordinara ŝako, sed kun tre interesaj apartaĵoj. Saman koloron havas ĉiuj 81 kvadratoj ludtabulaj kaj ankaŭ ĉiuj figuroj, kiujn distingas nur

ideogramoj sur ili. La figuroj moviĝas sufiĉe limigite, sed kompanse eblas reuzi la kaptitajn pecojn de la kontraŭulo, metante ilin ien ajn sur la tabulo.

Ĉi tiu tre bonvena lernolibro espreble malfermos al multaj la mirindan mondon de ŝogio. Krom la bazaj reguloj ĝi enhavas ampleksajn klarigojn pri strategio kaj dekpaĝan terminaron japanan-Esperantan-anglan.

Eta manko estas ke nenie oni klarigas la precizan signifon de la ideografiaĵoj per kiuj la figuroj estas markitaj, aŭ eĉ montras ilian aspekton en formato pli granda ol 5x5mm. Okcidentano kiu ne al kutimiĝis al la japana skribo preskaŭ bezonas lupleon por lerni distingi la figurojn sur la diagramoj.

Helpe de la libreto oni certe povas lerni ŝogion — pli malfacile estos trovi kompetentajn kontraŭulojn. Por ekzerco oni povas rekomendi la programon HM Shogi (hms41.

exe), troveblan en Interreto.

Estas bedaŭrinde ke ankoraŭ mankas simila baza lernilo pri ordinara ŝako. Ĝuste lernolibro, prefere kun aldonita terminareto, plej bone stabiligus la uzon de ŝakaj terminoj.

Kalle Kniivilä (Finnlando/Svedio)

Jen bonintence, jen utile

Mi resanigis PPPetron. Pero Ĉimbur. El la kroata trad. Lucija Borčić. Buchholz: MZ, 1995. 135p. 21cm. 22,20 gld. **Klopodu kompreni min!** Aira Kankkunen (1928). Buchholz: MZ, 1994. 50p. 21cm. Ilus. 13,20 gld.

Ŝajnas ke mia samlandano Émile Coué, inventinto de memsugestia metodo, dekomence moke kritikata, furoretas en nia komunumo. (Ĉu mi ne legis, antaŭ kelka tempo, strangan kolizion de Zamenhof kaj Coué reklame al la libro *L'homme qui a défié Babel?*...). Tio estus malbona aŭguro, konfirmo de nia dubinda farto.

Fakte, kiel pri balbutado, kies korekto plu restas terura defio por la kuracanto kaj suferiga vojo por la handikapulo, la senesperajn kazojn oni lasas ofte al hazardaj terapioj, preskaŭ ĉiam pli profitaj al la istoj ol al la atoj. *Mi resanigis...* estas plia pruvo de la Lafontena saĝeco de "La korvo kaj la vulpo": en ĝia lasta parto la aŭtoro, rakontante propran sperton (sukcesan, mi tuj diru!) aludas — ĉu naive, ĉu malice — tremigajn abismojn. Tio de-

truas lian jam malfortan argumentadon, des pli ke la stilo estas plumpa, la ritmo hezita kun peniga sinsekvo de sciencaj vidpunktoj, propraj opinioj kaj anekdotoj ofte apenaŭ kompreneblaj. Eble la traduko ne estas senpeka (ekz. trouzo de -um). Resume: bonintenca libro... preterlasebla.


Male, en *Klopodu kompreni min!* d-rino Kankkunen plene sukcesis miksi sciencan, prudentan kaj klarecon en agrabla, freŝa verketo, per kiu oni senpere sentas ŝiajn amon al malsanulo, respekton al individuo, kaj grandan sperton en la kuracarto. Brave! Gepatroj de aŭdodifektitaj infanoj legu ĉi tiun utilan instrukci-libron, kiel la sekvantan *Ĉu via bebo aŭdas?*, jam anoncitan (jan., p. 15), kies saman valoron mi ne pridubas, kvankam mi ankoraŭ ne legis ĝin!

D-ro Blaise Berthonneau (Francio)



Kun viaj kontribuajoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj aparte bonvenas. Koran dankon!

Laste aperis



Amikajn bondezirojn! Pazarĝik invitas vin! 85 jaroj *Esperanto-Societo en Pazarĝik*. Petko Arnaudov (1931). Red. Stojan Tanev. Pazarĝik: E-Societo "Radio", 1978 kaj 1996. 30+16p. 18cm resp. 20cm. Ilus. Historio de bulgara movadero. 6,00 gld.

Balkana kuirejo. *Elektitaj receptoj*. Snejana Uzunova, Atanas Uzunov, Petko Arnaudov. Pazarĝik: E-Societo "Radio", [1998]. 95p. 20cm. Ducento da receptoj kaj seplingva kuir-vortareto. 15,00 gld.

Dua invado de marsanoj. La Arkadij (1925-91) kaj Boris (1933) Strugackij. El la rusa trad. Mikaelo Bronŝtejn. Moskvo: Impeto, 1998. 111p. ISBN 5 7161 0044 9. 20cm. Romano pri eksterteranoj ne agresema, sed postulantaj stomakan sukon de homoj. 12,00 gld.

Esperanto — metodą nauczania programowanego w dziesięciu odcinkach (dla początkujących). Antoni Paweł Tabacki (1932). Wrocław: Silesia E-Asocio, 1996. 120p. 21cm. Lernolibro por pollingvaj komencantoj. 12,00 gld.

Fora ĉielarko. La (1967). Arkadij (1925-91) kaj Boris (1933) Strugackij. El la rusa trad. Mikaelo Bronŝtejn. Moskvo: Impeto, 1997. 130p. ISBN 5 7161 0042 2. 20cm. Sciencfikcia romano. Katastrofo metas finon al eksperimento pri transporto de materio trans iu ajn distanco. 15,00 gld.


Galla lingvo. La. *Historio, gramatiko, leksikono*. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1998. 107p. ISBN 2 906134 44 9. 21cm. Monografio pri pralingvo de i.a. Francio. 24,00 gld.

Lena... Poemaro memore al Lena Lebedeva. Div. aŭtoroj. Red. A. Ŝevĉenko. Moskvo: Impeto, 1998. 55p. ISBN 5 7161 0048 1. 20cm. Ilus. Gekonatoj rememoras Lenan (1965-1997). 6,00 gld.

Majo. (1836). Karel Hynek Mácha (1810-36). El la ĉeĥa trad. Tomáš Pumpr (1906-72). Prago: Ĉeĥa E-Asocio, 1997. 56p. ISBN 80 901334 5 2. 21cm. Ilus. Zdeněk Beneš. Fundamenta valorajo de la ĉeĥa poezio,

solenanta la majan belon de la naturo, en kungenia traduko. 7,50 gld.

Mia aglo-kurso. Josef Schiffer (1939). Villingen: la aŭtoro, 1998. 82p. 30cm. Ringe bind. Lernilo por germanlingvanoj, kiu utiligas la propedeŭtikan valoron de Esperanto por instrui milon da anglaj vortoj. 21,00 gld.



M. Bronŝtejn donacas du pliajn Strugackij-verkojn.



Mia kantaro I. Josef Schiffer (1939). Villingen: la aŭtoro, 1997 (2-a eld.). 130p. 21cm. Ringe bind. 99 kantoj plejparte germanaj, grupigitaj laŭ temoj. Kun muziknotoj. 21,00 gld.

Mia lernolibro I. Por mia enkonduka kurso. Josef Schiffer (1939). Villingen: la aŭtoro, 1997 (3-a eld.). 127p. 30cm. Ringe bind. Lernolibro por germanlingvaj komencantoj, taŭga ankaŭ por ekspresaj kursoj kaj memlernantoj. 19,50 gld.

Nekonato: la Zamenhofa homaranismo. André Caubel (1904-77). Beauville: Laŭte, 1998. 16p. 21cm. Represo de prelego pionira en sia tempo (1957). 2,40 gld.

Per kanto al Esperanto. *Elekto*. Red. Wojciech kaj Wiesław Tomaszewski. Varsovio: Pola E-Asocio, 1990. 62p. 21cm. 24 Esperantaj, polaj kaj diversnaciaj kantoj kun muziknotoj. 6,90 gld.

Tolero al minoritatoj. Referaĵoj de la Internacia Simpozio. Red. Zlatko Tišljar kaj Alojz Širec. El la kroata kaj slovena parte trad. Zlatko Tišljar. Maribor: Inter-Kulturo / Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, 1997. 141p. ISBN 961 6075 05 5. 21cm. Materialoj de simpozio en Maribor (1995), de 12 aŭtoroj — esperantistaj aŭ ne — el 7 landoj. 24,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Kasedoj: Mia kantaro I. Josef Schiffer (1939). Villingen: la aŭtoro, 1997. La melodioj de ĉiuj kantoj el la samtitola libro, surbendigataj helpe de komputila muzikprogramo. 18,00 gld.

Mia lernolibro I. Josef Schiffer (1939). Villingen: la aŭtoro, 1997. La lecionotekstoj kaj ekzercoj de la samtitola lernolibro. 18,00 gld.

Monero: Unua Kongreso de Kroataj Esperantistoj. *Valoro: 25 kuna*. Zagreb, 1997. Diametro: 3,1cm. Pagilo normale cirkulanta en Kroatio, numismatike interesa pro la kongresa simbolo. 21,00 gld.

Laste reaperis...

... Pluraj elĉerpitaj libroj, en tre limigita kvanto. Mendu laŭ la kutimaj kondiĉoj ĉe la Libroservo de UEA. Sesona rabato ekde tri ekzempleroj.

Esperanta himnaro. Kompilis kaj trad. Leonard I. Gentle. 1985. 133p. 12,00 gld.
La fontoj de Esperanto. Studo de Douglas B. Gregor. 1982 (2-a eld.). 32p. 10,80 gld.
Forkaptita. Romano de Robert L. Stevenson. Trad. A. Goodheir. 1989. 181p. 27,00 gld.
Himnaro Esperanta. Kompilis Montagu C. Butler. 1966 (5-a eld.). 205p. 9,00 gld.
Historio de Esperanto 1887-1912. Z. Adam. 1979. 8+144p. 15,90 gld.
La junaj detektivoj. Rakonto pri kontrabandistoj. James H. Sullivan. 1969. 57p. 4,50 gld.
La junaj trezor-serĉantoj. James H. Sullivan. 1968. 24p. 3,00 gld.
La karnavalo kaj la somnambulino. Romano de Karl L. Immermann. 1952. 104p. 9,00 gld.
Koko krias jam! Orig. novelaro. Ferenc Szilágyi. 1955. 225p. 30,00 gld. Triona rabato.
Nia sango. Teatraĵeto de Marjorie Boulton. 1970. 24p. 2,70 gld.
Ni homoj... Novelaro. Zora Heide. 1970. 72p. 11,70 gld.
Panjo. Poemaro. Jaroslav Seifert (Nobel-premiito). Tr. Jiří Kořínek. 1960. 77p. 9,00 gld.
Pli ol fantazio. Kvin rakontoj. A. Bagh-Høgsted. 1946. 70p. 7,50 gld.
Poeto fajrakora. Pri la verkaro de Baghy. Marjorie Boulton. 1983. 144p. 45,00 gld.
Secondary School Esperanto 1, 2. Markarian/Sullivan. 1980. 143 resp. 180p. Po 19,50 gld.
Sekretoj de la marestajloj. Petar Gjunio. Red. Marinko Gjivoje. 1960. 144p. 12,00 gld.
Tempesto super Akonkagvo. Pri ekspedicio. Tibor Sekelj. 1959. 227p. 18,00 gld.
Tiel profunda estas la nokto. Afrik-fonaj rakontoj. Villy E. Risør. 1959. 112p. 6,00 gld.
Tra dezerto kaj praarbaro. Junulara romano. H. Sienkiewicz. 1978. 315p. 27,00 gld.
Tri verkoj de Volter (Voltaire). Trad. E. Lanti. 1956. 312p. 21,00 gld.
Unua legolibro. Gradigitaj legaĵoj kun frazlibro. Kabe. 1985. 160p. 9,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



INSTRUADO. *Internacia E-Instituto:* <http://www.geocities.com/Athens/Parthenon/1464/>. *Laborkomisiono de ILEI pri Lernejoj Konkursoj:* <http://w3.datanet.hu/~bjg/esperanto/>

JAPANIO. *Esperanto-Domo en Yatugatake:* <http://www.infotrans.or.jp/~klivo/yatsu.htm/>

KAMPANJO 2000. Ĉiuj rilataj artikoloj: <http://www.best.com/~donh/Esperanto/Kampanjo2000/>

KANADO, KEBEKIO. <http://www3.sympatico.ca/esperanto/>

KOLOMBIO. <http://esperanto-kolombio.org/>

KOMERCO. *IKEF*, oficiala paĝo: <http://www2.dk-online.dk/users/teamholm/ikef.htm/>

KUBO. *Kuba E-Asocio:* <http://www.infocom.etecsca.cu/new/esperanto/index.htm/>

LITERATURO. *Kafka-paĝo* (anglalingva) de Mauro Nervi: <http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/3347/kafka.html/>. *Karl-May-Societo en Esperanto:* <http://www.theo-physik.uni-kiel.de/~starrst/kmg/sprachen/speranto/index.htm/>. *Fratoj Strugackij:* Listo de eraroj (A. Gofen) en la E-traduko de *Pikniko ĉe vojrandoj:* <http://www.best.com/~donh/Esperanto/Literaturo/pikeraroj.html/>

RADIO. *Estonio*, E-lingvaj elsendoj: <http://www.er.ee/tallinn/>

RELIGIO. *Bahaa Esperanto-Ligo:* <http://www.bahai.de/bahaaeligo/>. *Oomoto:* <http://www.oomoto.or.jp/>. *Ŭonbulismo:* <http://won.wonbuddhism.or.kr/esperanto/index.html/>

REVUOJ. *El Popola Ĉinio:* <http://www.china.org.cn/ElPopolaCxinio/>. *Espero Katolika:* <http://www.geocities.com/Paris/Metro/2013/ek.html/>. *Juna Amiko:* <http://w3.datanet.hu/~bjg/esperanto/>. *La Ondo de Esperanto:* <http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/3438/10-41.html/>

TRADUKADO. *Internacia Tradukreto pere de Esperanto:* <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/ret/itre/htm/>

UNIVERSALAJ KONGRESOJ. *Montpeliero (1998):* <http://www.mygale.org/10/univkong/>. *Berlino (1999):* <http://www.geocities.com/SoHo/Studios/6120/esp.html/>

••••• Serĉu per TROVANTO •••••

Funkcias ekde marto la katalogo TROVANTO de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kun Esperanto kiel serĉlingvo: http://www.onb.ac.at/online_s/esperanto/espdb.htm/. Oni povas serĉi laŭ aŭtoroj, titoloj, temoj kaj aliaj kategorioj ĉiujn dokumentojn akiritajn de la muzeo ekde 1996, kaj iom post iom enkomputiligos la tuta havaĵo. Estas grave ke multaj vizitu TROVANTO, ĉar Aŭstria Nacia Biblioteko faras statistikon pri la uzado de ĝiaj katalogoj. Ligo en via hejmpaĝo helpas en la diskonigo de TROVANTO.

Loke



• **Bosnio: Kvin infanoj al Bretonio**
Kvin infanoj el la bosnia urbo Goražde, akompanataj de du E-instruistoj, partoprenis en la kongreso de SAT-Amikaro (11-13 apr.) en Quintin, Bretonio. La iniciato ĝermis el ideo de la franca instruistino Nicole Rizzoni, kiu jam tri fojojn iris al Bosnio por alporti helpon kadre de la asocio Bretagne-Goražde kaj instruis tie Esperanton al infanoj. (H. Masson)

• Britio: Politika apogo

La estroj de kvar ĉefaj politikaj partioj, i.a. ĉefministro Tony Blair, sendis apog-leterojn al la 82-a Brita E-Kongreso (10-12 apr. Chester), malfermitan de la urbestro, kiun ĉeestis ĉ. 200 homoj el dek landoj, i.a. UEA-sekretario Michela Lipari. (B. Burnett, H. Chapman).

Gvidate de Vera Roknić, partoprenis grupo de kroataj E-lernantoj, recitante kroatan poezion, i.a. la poemon "Balado de Boško kaj Admira" de Marjorie Boulton, inspiritan de la bosnia milito. La vojaĝon de la grupo subvenciis kroata instanco, la restadon (9-16 apr.) brita fondaĵo. (S. Štimec)

• Finnlando: Koboldo-seminario

En la ĉiujara aranĝo Vintraj Tagoj (Kuopio, 21-22 feb.), la Kultura Centro de Iisalmi prezentis al la ĉ. 55 partoprenantoj planon pri "internacia koboldo-seminario" (aŭguste de 1999), kiu celas savi pereontajn rakontojn pri naturaj spiritoj, gefeoj kaj koboldoj. (R. Pyhälä, Interredaktore)

• Germanio: La plej frua klubo

La unua E-grupo en la mondo, Esperanto-Grupo Nürnberg, festos sian 110-jariĝon per malgranda solenaĵo la 24-an de oktobro. Salutoj bonvenaj: Anny Hartwig, Pirkheimerstr. 11, DE-90408 Nürnberg, Germanio; ☎/☎+49/911/359-658. Ĉe la sama adreso eblas mendi kontraŭ internacia respondkupono la broŝuron *Rerigardo 1997*, en kiu grupanoj varie raportas pri la pasinta movada jaro. (A. Hartwig, B. Maurer)

Fake



• Historio: Komenio-Zamenhof

Ladislav Fiala (Nowickiego 3/20, PL-02112 Warszawa, Pollando), la iniciatinto de la ekspozicio "De Komenio ĝis Zamenhof" (vd. feb., p. 40), instigas E-klubojn okazigi prelegojn pri la praktika realigo de la ideoj de ĉi tiuj du granduloj, ekz. invitante Komenio-spertulon prelegi en nacia lingvo.

• Sporto: Stafeto de 4000 km-oj

La marŝo-grupo de la fervojista liber-tempa organizo en Udine (Italio) planas stafet-marŝon inter la 25-a de julio kaj la 10-a de aŭgusto: 20 atletoj marŝos alterne kaj senhalte sur distanco de 4000 km-oj, de Adriatiko ĝis la Norvega Maro. La konfirmota itinero estas: Udine — Tarvisio (Italio) — Salzburg (Aŭstrio) — Straubing — Weiden in der Oberpfalz — Treuenbrietzen — antaŭurbo de Berlino — Sassnitz (Germanio) — Trelleborg — Smedjebacken — Piteå (Svedio) — Norda Kabo (Norvegio). Pro la atendebla

• Muziko: Kolekto 2000

Kadre de Kampanjo 2000, la dekjariga Esperanta rok-asocio EUKOKA (FR-31450 Donneville, Francio; ☎ +33/5/61-81-95-65) lanĉas la projekton Kolekto 2000, por aperigi ĝis la jaro 2000 kompaktdisken serion (6-8) de Esperantaj muzikistoj. Ĝis la Montpeliera UK oni planas du titolojn, de JoMo kaj de J. Yvart. Alvokataj estas artistoj kunlaborantaj, abonontoj de la serio, monsubtenontoj kaj mecenatoj.



reklam-efiko, jen ŝanco por informado ekspluatenda de Esperanto-grupoj laŭlonge de tiu itinero. Konsiloj kaj informoj ĉe: Nova Espero Friuli, p/a Dopolavoro Ferroviario, via Cernaia, 2, 33100 Udine, Italio; ☎ (Giuseppe Valente) +39/432/522-179; ✉ nored@iol.it (Interredaktore)

• Televido: CNN, pli amplekse

Ni raportis (marto, p. 48) pri 2-minuta elsendo pri Esperanto decembre en la tutmonda kanalo CNN. Unu monaton poste, la 30-an de januaro, la eŭropa-azia programo de CNN dediĉis duonhoron al la eŭropa lingvo-problemo, pozitive pritraktante E-on. (Heroldo)

OFICIALA INFORMILO

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Usono: William Keith Bledsoe.

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Aŭstralio: Ralph Harry. Meksiko: Julie L. Regal.

AMIKOJ (minimumo \$10): Aŭstralio: Tom Elliott; Teresa M. Metherall. Usono: Charlene Baker; Henry L. Ginn.

PATRONOJ DE TEJO 1998

Belgio: Stella De Weerd. Finnlando: Allan Mehtonen. Francio: Barbara Despiney; Henri Roy; Richard Cash. Germanio: Martin Haase. Hispanio: Francisco Belmonte Sánchez.

SOCIETO ZAMENHOF 1998

Aŭstralio: Jean A. Lehané; Keppel E. Enderby; Nassif Isaac; Ralph Harry; Teresa M. Metherall. Belgio: Jean P. Bovy; Marcel Delforge; Stella De Weerd; Jos Vandeborgh; Karel Van Steenberg. Britio: E.E. Mallett. Francio: Raymond Boré; Eskil Svane; Henri Roy; Jeanne Roy; Maurice Sujet. Germanio: Eva Bork; Albrecht Kronenberger; Rokuro Makabe; Marieta Moschner. Italio: Maria Teresa Malatesta. Japanio:

Wilhelm Schmid; Satoo Ŝoiĉi. Kanado: Marijke Meijer. Korea Resp.: LEE Chong-Yeong; Yungmyung Kim. Meksiko: Julie L. Regal. Nederlando: P.H. Damsté. Slovenio: Jožica Židanik. Svedio: Gunnar Olsson; Inga-Maj Lindkvist; Malte Gahlin. Usono: Alberta Seabold Casey; Doris Vallon-Wheeler; Gigi Harabagiu; William Keith Bledsoe.

DONACOJ (1998)

(NLG) ĝis la 31-a de marto

Fondaĵo Afriko: Svedio: J. Hammarberg 25,64. Nederlando: Memore al Nora Moerbeek 100,00. Sumo ĉi-jara 2733,84.

Fondaĵo Ameriko: Usono: L. Harmon 50,50. Sumo ĉi-jara 144,84.

Fondaĵo Azio: Japanio: U. Kobayasi 32,10; H. Obara 32,10; H. Takahasi 64,20; S. Yosikawa 32,10. Sumo ĉi-jara 746,76.

Fondaĵo Canuto: Institucio Hodler 5000,00. Egiptio: G. Penet 50,00. Francio: M. Basso 13,44; P. Brandy 87,36. Germanio: W. Günther 68,63; G. Macioszek 337,53; J. Rohde 110,26.

Nederlando: J.A. Tuinder 100,00. Sumo ĉi-jara 6740,76.

Konto Espero: Germanio: H.G. Strauss 112,48. Nederlando: Anonime 50,00. Sumo ĉi-jara 162,48.

Propaganda Konto: Italio: S.G. Delcarmine 7,38. Nederlando: Anonime 50,00. Sumo ĉi-jara 57,38.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Germanio: F.M. Reisel 224,97. Sumo ĉi-jara 287,76.

Volontula Fondaĵo: Institucio Hodler 1000,00. Sumo ĉi-jara 1458,11.

Kampanjo 2000: Belgio: G. Pirlot 543,95. Egiptio: G. Penet 50,00. Germanio: R. Makabe 100,00. Italio: R. Corsetti 1000,00. Japanio: Osaki Kazuo 1614,48. Nederlando: Memore al Nora Moerbeek 325,00. Sumo ĉi-jara 4733,43.

Ĝenerala Kaso: Usono: W.K. Bledsoe 201,87; P.W. Ledeen 50,47; R.P. Lynch 151,41. Sumo ĉi-jara 1786,09.

Renovigo de la Domo: Frisa Esperantista Rondo 4000,00. Sumo ĉi-jara 4000,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

INVITILO: Sonetmondrekordanto-polesperantpoezikant-aŭtoro kore invitas ĉiujn amikojn, spektantojn, aŭdantojn kaj legantojn al la librovernisaĵo sur la placo Stüssihofstatt sub tilio ĉe la put-kolono, la 30-an de majo 1998 sabate je la 11a horo matene en Zuriko 1 CH (se amata Dio sendus pluvon, tiam ĉe Stüssihofstatt 11 en la vinokelo).

EN 3500 LINGVOJ oni trovas po unu tekston, ĉiam kun traduko en Esperanto, en antologio pri la lingvoj de la mondo. Sendu laŭplaĉan tekston en via lingvo, kun Esperanto-traduko kaj fonetika transskribo (se eble, kun sonbendo) al Alexandre Xavier Casanova Domingo, Calle de las Peñuelas, 18, 4°C, ES-28005 Madrid, Hispanio.

GRUPO DE MOTORCIKLISTOJ esperantistaj estas fondota. Kontakto: André Rambeaux, 27, La Fagne de Chimay, BE-

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifen de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

6460 Chimay, Belgio; ☎+32/60/412-160.

AL REAGINTOJ pri la forpaso de Nora koran dankon! Rob Moerbeek.

SOMERA FAMILIA TENDARO (21-a SEFT) en Thomsdorf, regiono de la urbeto Feldberg, Germanio, 18-26 julio. Informas Eckard Raabe, Staakener Heuweg 1, DE-14612 Falkensee, Germanio.

BICIKLAN KARAVANON el Strasburgo al Montpeliero organizas BEMI, kun ekiro la 14-an de julio. Kontakto: Cyrille

Pinardon, 44 rue du Sahel, FR-75012 Paris, Francio.

"KUNE KRESKANTAJ sur la Ter-globo": Nova projekto de la ĉina E-RETO 21 (☐ccht@public.cc.jl.cn) instigas kaj helpas infanojn kaj gejunulojn diverslandajn lerni Esperanton, por ke ili amikiĝu per internacia korespondado.

AL LERNEJA KLASO, korespondanta en Esperanto, sendu por ekspozicio de korespondadoj mesaĝojn kun unu linio en via lingvo, unu linio en E-o, kaj tria linio lasita libera por franca traduko; ankaŭ poŝtkartojn,

pm-ojn, eltondaĵojn, desegnojn de infanoj kun frazo kaj precipe la persona nomo, aĝo kaj sekso de la infano. S-ino Françoise Noireau, Klaso CM2, École publique Sainte Catherine, rue E. Chancel, FR-05100 Briançon, Francio.

KRAKOVA RENDEVUO Internacia Esperantista, 20-25 junio. Zbigniew Warmuz, ul. Bajeczna 1/10, PL-31-566 Kraków, Pollando.

UZITAJN TELEFONKARTOJN volas interŝanĝi sekretario ĉe E-kulturdomo, José Odilon Pereira de Souza, Rua 07 Casa 467 - Conjunto Jereissati 1, BR-61-940 Maracanaú - CE, Brazilo.

VERDA PRINTEMPO sur la Baltmara insulo Volin, Międzyzdroje, Pollando, 18-27 junio. Tuta feriado 10-taga (hotelo, manĝoj) kostas 500 DEM. Aliĝu ĝis la 25-a de majo ĉe Pola Esperanto-Asocio, PL-70-358 Szczecin 3, p.f. 14. Pollando.

Per-sone



• Martinet 90-jara

La mond-fama franca lingvisto André Martinet fariĝis 90-jara la 12-an de aprilo. Dum la naskiĝtaga akcepto en lia hejmo, ĉeestis kaj gratulis dekoj da lingvistoj el diversaj landoj. Nome de UEA, François Lo Jacomo enmanigis al li la ĵus aperintajn aktojn de la Nitobe-simpozio (vd. apr., p. 72). Zorge de Detlev



André Martinet

Blanke, Claude Gacond kaj Simo Mi-lojević, ankaŭ Esperantaj revuoj kaj libroj aperintaj en 1908, la naskiĝjaro de Martinet, povis esti transdonitaj al li.


Martinet okupis la postenon de lingvistika direktoro (1946-48) de Internacia Helplingva Asocio (IALA), sed

forlasis ĝin antaŭ la ellaboro de la planlingvo Interlingua. Li detalis siajn interlingvistikajn ideojn en intervjuo donita en 1987 al Blanke kaj Lo Jacomo, kiu aperis en Esperanta traduko ĉe UEA (*Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko*, 4,80 gld.).

• Rytjkov: Por memorlibro


La 1-an de septembro pasos 25 jaroj post la morto de Nikolaj Rytjkov (1913-1973), rusa aktoro kun malordinara sorto, kiu pasigis 17 jarojn en Stalinaj malliberejoj pro esperantisteco, post 1956 re-aktoris (ofte la rolon de Lenin) en Moskvo, kaj en 1965, okaze de Esperanto-konferenco en Vieno, ne revenis en Sovetion.

M. Abolskaja (p.k. 381, Sankt-Peterburg, RU-197022 Rusio), kiu korespondis kun Rytjkov dum lia Moskva periodo, kompilas Rytjkov-memorlibron kaj petas ĉiujn kiuj havas leterojn, fotojn k.s. de Rytjkov, skribi al ŝi. (Interredaktore)



Nikolaj Rytjkov ludas la rolon de Lenin por okcident-germana televidserio.

Esperanto en radio



Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (horoj laŭ UTC)

Ĉiutagaj elsendoj

04:30-05:00*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
11:00-11:27	Ĉina R. Int.	9535, 7170	Azio Orienta, Japanio, Koreio
13:00-13:27	Ĉina R. Int.	11600, 11840	Azio Sudorienta
13:30-14:00*	Pola R. Varsovio	7305, 7285, Sat (1)	Eŭropo
18:00-18:30*	Pola R. Varsovio	6095, 7205, Sat (1)	Eŭropo
20:00-20:27	Ĉina R. Int.	7405, 9965, 9900	Eŭropo
20:30-20:55*	Pola R. Varsovio	7285, 7270, 6035, 6095	Eŭropo
22:30-22:57	Ĉina R. Int.	6860, 6950	Ameriko Latina, Eŭropo
0:00-24:00	Estonia R.	TTT: http://www.er.ee/Tallinn/espeesti.ram/	
0:00-24:00	WRN / Pola R.	TTT: http://www.wrn.org/stations/poland.html/	

Dimanĉaj elsendoj

04:05-04:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (2)	Eŭropo
07:00-07:30	R. Havano Kubo	9820	Azio Pacifika, Ameriko Norda
14:05-14:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (2)	Eŭropo, Afriko Okcidenta
15:00-15:30	R. Havano Kubo	11760	Ameriko, Karibio
19:20-19:30*	R. Vatikana	1530, 5882, 4005, 7250, Sat (3)	Eŭropo
19:20-19:30*	R. Vatikana	Sat (4)	Ameriko
19:30-20:00	R. Havano Kubo	9550, 13715	Eŭropo, Mediteraneo
22:00-22:30	R. Havano Kubo	9550, 13715	Eŭropo, Mediteraneo
23:05-23:30	R. Aŭstria Int.	9870	Ameriko Suda
23:30-24:00	R. Havano Kubo	11760, 11875, 6070	Ameriko, Karibio

Rimarko: Dimanĉaj elsendoj de R. Vatikana ankaŭ dum kristanaj festotagoj, sambore.

Dum aliaj tagoj

19:20-19:35*	R. Vatikana	1611, 6185	Eŭropo (merkredo)
19:20-19:35*	R. Vatikana	Sat (5)	Azio, Afriko (merkredo)
20:00-20:20	RAI Internacia	9655, 11860, Sat (6)	Eŭropo (sabate)

*Programo kies horo estas konstanta laŭ Meza Eŭropa Tempo (do ŝanĝiĝos ekde 25 okt. 1998). Nuntempe, MET=UTC + 2 horoj.

Sume, ĉiusemajne ĉirkaŭ 30:31 horoj da elsendoj.

Satelitaj indikoj (nomo kaj pozicio de satelito, frekvenco kaj polarizado [+ nomo de la televid-kanalo], frekvenco de la aŭda subportanto)

- (1) Pola R. Varsovio Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
- (2) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (kanalo 45, Bayern 3), 8.10 MHz, per Astra Diĝita Radio (ADR)
- (3) R. Vatikana Eutelsat II F1 13 E, 10.987 GHz Vpol (NBC), 7.38 MHz (Eŭropo)
- (4) R. Vatikana Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 (Atlantiko, Amerikoj)
- (5) R. Vatikana Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 (Azio, Afriko)
- (6) RAI Internacia Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.446 GHz Vpol (Rai Due), 7.56 MHz

Fonto: OSIEK-AERA, *Amikaro de Esperanto en Radio*
<http://members.aol.com/OSIEK/AERA/>

Tramonde peronde

Pola Radio. La 4-an de aprilo la Esperanto-elsendoj de Pola Radio eniris la 40-an jaron de sia disaŭdiĝo. Je tiu okazo la Esperanto-Redakcio preparis kelkajn datrevenajn programojn, ekz. intervjuon kun Jerzy Uspieński, kiu redaktis la unuan elsendon la 4-an de aprilo 1959. (Lia gasto antaŭ 39 jaroj estis Gian Carlo Fighiera, la unua eksterlandano interjuita de la Esperanto-Redakcio.) En speciala jubilea magazino parolis Stefan Maul (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio), prof. Michel Duc Goninaz (PIV-redaktoro), Osmo Buller kaj, flanke de Pola Radio, Barbara Pietrzak kaj Andrzej Pettyn. Ĉina Radio Internacia sendis gratulon en formo de poemo.

Estonia Radio en Esperanto aŭskultebblas per komputilo. Por rekte aliri la "elsendon": <http://www.er.ee/tallinn/espeesti.ram>. La programo renoviĝas en ĉiu marda vespero. Por kopii la RealAudio-sondokumenton al via durdisko: <http://www.er.ee/tallinn/ra/espeesti.ra>. Aliflanke Estonia Radio tute ne plu riceveblas per mallongaj ondoj, sed nur loke en Tallinn per FM: mar 22h30 — 22h45: 103.5 MHz.

Kanariaj Insuloj. La stacio Onda Interior ("Interna Ondo"), kiu aŭdigas programojn pri sano, kanaria historio, kulturo kaj humanismo, nun en ĉiu marda vespero (22:00-23:00) elsendas en du lingvoj (Esperante kaj hispane) per FM 105 Mhz. Dum la unua duonhoro oni enkondukas per hispana lingvo al Esperanto, per komentarioj, sloganoj ktp.; en la dua parto elsendiĝas E-kurso. La stacio informas pri Esperanto ankaŭ en aliaj horoj.

En dua fazo, oni planas elsendi kompletan horon nur Esperante. Tiucele Onda Interior jam kunlaboras kun Radio Esperanto en Västerås (Svedio). Kontakt-adreso: Redaktoro Francisco José Dávila Dorta, Onda Interior FM-105, Esperanto, Str. Antonio Nebrija, 21 — 2a etaĝo, EIC-38010 Santa Cruz de Tenerife, Kanariaj Insuloj; ✉ fjdavila@arrakis.es.

Radio Havano 10-jariĝos en septembro. Salutmesaĝoj el ĉiuj mondpartoj estas bonvenaj. Adreso: Esperanto-redakcio, pf. 6240, Ciudad de la Habana, Kubo; ✉ radiohc@mail.infocom.etecsa.cu; TTT-paĝo: <http://www.radiohc.org/>.

Nekrologoj

Heikki ALIKOSKI (1912-1997), matematikisto, delegito ĉi-faka dum kvarona jarcento, forpasis la 28-an de decembro en Turku (Finnlando).

M.C.J. VAN DER GRAAF (1903-1998) mortis la 19-an de februaro en Dordrecht (Nederlando). Ŝi estis membro de UEA 50 jarojn, fine dumviva membro.

Willem P. ROELOFS (1910-1998), pli konata kiel Petro Rulofido, forpasis la 11-an de marto en Soest (Nederlando). Li lernis Esperanton en 1927 kun sia patro. Estinte membro de UEA ekde 1929, ankaŭ kiel fakdelegito pri kemio, li ekis en 1962 (la epoko de la debato pri "ata/ita") pro lingva malkonsento. Tio ne malhelpis lin subteni la Asocion grandanime kiel patrono de TEJO, ano de Societo Zamenhof kaj mecenato de diversaj iniciatoj. Studinte kemion, Rulofido doktoriĝis en 1951 per disertaĵo pri ekonomika temo, kaj ankaŭ en la Harlema UK (1954) li prelegis pri mono, "fundamenta homa kreaĵo". Ekde la lanĉo



Petro Rulofido

de *Scienca Revuo* en 1948 li estis ties kunredaktoro ĝis 1961. Dum pluraj jardekoj li studis la refleksivon en Esperanto, kunmetante ekzemplaron de du mil citaĵoj. De 1977 li agis kiel kasisto kaj redaktoro de Universala Ligo, malfondita en 1996. Por Rulofido — frua rifuzanto de militservo kaj aktiva pacisto — Esperanto, pacismo

Stojan Ĝuĝev

(1902-1998)

Stojan Ĝuĝev, Honora Membro de UEA (ekde 1989) kaj de Bulgara E-Asocio, internacie konata muzikologo, pioniro de muzika etnografio, laŭreato de prestiĝaj premioj bulgaraj kaj alilandaj, forpasis la 18-an de marto en Sofio.

Ĝuĝev naskiĝis la 19-an de decembro 1902 en Pazarĝik, kie li kunfondis Esperanto-rondon jam en sia gimnazio. Kiel studento en Sofio (1921-) kaj ĉe Sorbono en Parizo (1926-), li aktivis en la junularaj E-rondoj Sofiaj, poste ankaŭ ĉe grupo en Parizo. En la franca ĉefurbo li konatiĝis kun multaj elstaruloj de la movado (Cart, Corret, Kornfeld-Grenkamp k.a.) kaj, laŭ invito de K. Nišimura, iĝis konstanta korespondanto (1931-32) de la revuo *Oomoto Internacia*.

Post doktoriĝo pri popolmuziko en 1931, sekvajare li revenis al Bulgario



Stojan Ĝuĝev

kaj ekprofesoris ĉe katedro de muziksciencoj. Dume li vicprezidis, poste prezidis (1939-46) Bulgaran Esperantistan Asocion kaj ĉefredaktoris dum kelkaj jaroj ties revuon *Bulgara Esperantisto*.

Post la milito li prelegis en pluraj Someraj Universitatoj pri muziko-

logio kaj fonologio, kaj ekstermovade, en sciencaj konferencoj, pri la lingvoproblemo. Li gvidis Muzikan Esperanto-Ligon kiel prezidanto (1974-86). Ĝuĝev elektigis en la Akademion de Esperanto en 1970 kaj funkciis kiel ĝia vicprezidanto de 1979 ĝis 1986. Li membris en AIS. En 1986 li kunfondis, vicprezidis kaj poste prezidis (1988) Internacian Scienca Akademion Comenius, kiu celas

prosperigi la scienca uzon de Esperanto, kaj kies anoj plejparte membras en naciaj sciencaj akademioj.

Plurflanka aŭtoro faka kaj beletra, li verkis *Lingvo kaj socio* (1946), gajnis unuan premion en la poezia branĉo de Belartaj Konkursoj en 1975, kaj tradukis el la bulgara poezio.

kaj novaj ekonomiaj konceptoj estis eroj de la sama homaranisma mond-rigardo.

Stanisław ŚWISTAK (1941-1998) mortis la 29-an de marto en Krakovo. Aktiva ekde frua aĝo en la loka kaj pola movado, en 1963 li gajnis unuan premion en la Oratora Konkurso de

la UK en Sofio. Membro de UEA ekde 1957, inter 1974 kaj 1977 li servis kiel estrarano pri informado kaj turismo, komitatano kaj gvidanto de komisiono pri informado. De 1972 ĝis 1977 li prezidis Polan E-Asocion. La internacia kulmino de lia Esperanto-agado estis gvidado de la LKK por la jubilea Varsovia UK (1987).

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-765-0880 [h], +82-53-652-4488 [of]; ☎ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ☎ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎ +31-50-3613763 [of]; ✉ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ☎ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

Komitato de UEA: Jarlibro 1997 enhavas liston de ĉiuj komitatanoj (vd. p. 15-19).

NOVAĴOJ


de la eldona fako
de UEA

POR LERNI KAJ ARGUMENTI

**AL LINGVA DEMOKRATIO / TOWARDS LINGUISTIC
DEMOCRACY / VERS LA DÉMOCRATIE LINGUISTIQUE.**

**Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj,
Prago, 20-23 julio 1996. Mark Fettes kaj
Suzanne Bolduc (red.). Rotterdam: UEA, 1998. 212p.
ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Prezo: 22,50 gld.**

Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj organizaĵoj utilas nur por
simbolaj politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de plurlingva
demokratio efektive diskriminacias? Kian rolon ludu lokaj
lingvoj en la solvado de mondaj problemoj? Kion eblas lerni el
la spertoj pri Esperanto? Jen temoj de la Nitobe-Simpozio en la
Prago UK, kies materialoj nun haveblas libroforme.
Ĉiu kontribuado en la originala lingvo (angla, franca aŭ
Esperanto), kun resumo en ĉiuj tri lingvoj.
La angla teksto de la pionira raporto "Esperanto kaj la lingva
demando ĉe Ligo de Nacioj" de NITOBÉ Inazô estas unuafoje
publikigita ĉi-libre.



RIKOLTO DE 50 JAROJ



PAJLEROJ KAJ STOPLOJ.
Elektitaj prozaĵoj. William
Auld. Rotterdam: UEA, 1997.
348p. ISBN 92 9017 052 2.
21cm. Prezo: 42,00 gld.

"La jaro 1997 signas la 50-
jariĝon de mia serioza verkado
en Esperanto. La ĉefa rikolto de
tiu verkado estas la kvindek
de miaj libroj (ankoraŭ
plimultiĝonta) sur breto en mia
biblioteko. Sed post ĉiu
rikoltado postrestas surkampe
pajleroj kaj stoploj, kiujn oni
kutime forbalaas aŭ surtretas.
— Mi do decidis kolekti libro-

forme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur
efemeran, kaj jen la rezulto." (William Auld)

La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj,
Tradukoj, Libro-kulturo. Tre bela grafika prezento.

LIBRO DE UNESKO EN ESPERANTO!



**KULTURO KAJ
TEKNOLOGIO.**
Studo pri la jara
temo por 1997
de la Monda Jardeko de
Kultura Evoluigo.
Andrew O. Urevbu.
Trad. Johano Rapley.
Rotterdam: UEA, 1997. 64p.
ISBN 92 9017 053 0. 21 cm.
Prezo: 15,00 gld.

Analizo pri la rilato inter
kulturo kaj teknologio. Kiel
efikas kulturo sur teknologian
evoluo? Ĉu kultura evoluo
stimulas teknologian ŝanĝon?

Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj
taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro
la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio,
Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.



TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefono: +31 10 436 1044 Telefakso: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>



KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRÉSILLON – FR-49150 BAUGÉ
telefono : 02 41 89 10 34

ilei

- 20/07 – 31/07 Internacia Metodika Semajno de ILEI por E-instruantoj (du apartajn semajnojn gvidos Duncan Charters kaj Katalin Smidélusj)

Pliaj detaloj estas haveblaj kontraŭ respondkuponon aŭ afrankita koverto sendota al: Esperanto – P. Babin, 17 rue Romain Rolland, FR-85180 Le Château d'Olonne, Francio.



En 1997 242 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof


Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1997 estis bela SZ-ŝlosilujo. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KŜIAKTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŜIAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1997 **KŜIAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1998

Aŭstralio 28 dolaroj	Francio 120 frankoj	Nederlando 39 guldenoj
Aŭstrio 250 ŭilingoj	Germanio 35 markoj	Norvegio 140 kronoj
Belgio 730 frankoj	Hispanio 2200 pesetoj	Pollando 20 guldenoj
Brazilo 20 guldenoj	Israelo 30 guldenoj	Portugallio 2400 eskudoj
Britio 15 pundoj	Italio 32000 liroj	Svedio 150 kronoj
Danio 130 kronoj	Japanio 2600 enoj	Svislando 28 frankoj
Finnlando 105 markoj	Kanado 29 dolaroj	Usono 22 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabuloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



Fabeloj, mirindaĵoj kaj internaciaj rakontoj sur pli ol 400 paĝoj ...



"Unika legolibro, plej bonveniginda kaj rekomendinda al ĉiuj studentoj de la Internacia Lingvo."

Baldur Ragnarsson

Rotterdam: UEA, 1993 (dua korektita eld.). 431p. 21cm. Prezo: 36,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

DRILLING BILLY

KOMPUTILA LUDO
KUN PLI OL
150 LUDNIVELOJ

EN ESPERANTO KAJ 12 ALIAJ
LINGVOJ. 54,00 GLD. TRIONA
RABATO EKDE 3 EKZEMPLEROJ.
HEJMPAĜO: WWW.ESPERANTO.DK/BILLY/.

